Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal
11

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 29-500

NRO 7-9
3-a JARO
JULIO-SEPTEMBRO 1948

EL LA ENHAVO:

Ni laboru por la paco

Letero pri la Esperanto-movado en Kanado kaj Usono

La Esperanto-movado en Aŭstrio

Informoj de la Laborista Esperantistaro

Katolika Esperanta Vivo

Bibliografio

LASTA INFORMO:

Radio-Wien disaŭdigas Esperanton de nun ĉiun ĵaŭdon je 18,45—19,00 MET. Aŭskultu kaj skribu pri la akcepto!

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- aŭ eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4.—, por eksterlandanoj 4 int. respondkuponojn. Ni petas skribu la adresojn nepre bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — S-ro Othmar Bühner, Görlitzen 36, Bad St. Leonhard, Lavanttal, Kärnten, interŝ. il. PK kun ĉiuj landoj.

F-ino Augusta Pfenich, Görlitzen 36, Bad St. Leonhard, Lavanttal, Kärnten, interŝ. il. PK kun tutmondo.

S-ro Albin Anthofer, Bad St. Leonhard, Lavanttal, Kärnten, interŝ. PK il. kun tutmondo.

S-ro Karl Martin, juĝeja oficisto, Bad St. Leonhard, Lavanttal, Kärnten, kor. per il. PK kun ĉ. l.

S-ro Franz Anthofer, Bad St. Leonhard, Lavanttal, Kärnten, interŝ. il PK kun tutmondo.

S-ro Dr. Walter Vaterl, Mooskirchen 27, Stmk., deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj kaj poŝtmarkoin. Mi nepre respondos.

S-ro Hans Chlubna, Stadtrandsiedlung 28, a. d. Erzherzog Karlstraße,, Wien XXII., deziras korespondi kun eksterlando.

Germanujo. — S-ino Elfriede Bockfeld, (10 a) Rosenthal bei Hirschfelde, Sachsen, komencantino, dez. kor. kun ĉ. l. per il. PK.

S-ro H. Horst Weigmann, (20) Hannover-Döhren, Peinerstr. 22 k, komencanto, dez. kor. kun ges-anoj diverslande.

Hungarujo. — Andras Kruppa, Diosgyör-Nasgyar, B. M. Arok u. 19, Hungarujo, deziras korespondi kun eksterlandaj junuloj..

Portugalujo. — S-ro Renato Jorge S. Vasco, Rua Alexandre Hercufano 21, Portimao, dez. interŝ. il. PK kun ĉ. l.

Brasilio. — S-ro Liberal Francisco Carpini, Centro Telefonico Ararense, A r a r a s — S. Paulo, Beasilio, kor. kun ges-anoj tutmonde.

Kiu vendas vortaron de Bensen? — Mi aĉetus la il. vortaron kaj gramatikon de Bensen je 100 aŭstr. ŝil. Adreso: Alois Postl, Kopfing 83, Post Kaindorf, Oststeiermark, Aŭstrio.

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

3-a jaro | JULIO / SEPTEMBRO 1948 | n-ro 7—9

Ni laboru por la paco!

Karaj homgefratoj, multegaj homoj fartas malbone. Multegaj havas mankon je ĉio plej necesa: malbonan loĝejon, mizeran vestaĵon, malsufiĉan nutraĵon. Multegaj el ni devas laboregi super sia forto kaj ne povas zorgi pri pli bona edukado de siaj infanoj. Kiom da zorgoj alportas preskaŭ ĉiu tago, sed kiom maloftaj estas la malgrandaj ĝojoj! Kie restas la ĝuado de l' verkoj de la muzikistoj, pentristoj, skulptistoj, poetoj kaj pensuloj?

Sed de kie devenas ĉi tiu granda mizero inter la homaro? Krom aliaj ekonomiaj kaj societaj cirkonstancoj malbonaj ĝi estas la sekvo de la multaj militoj kaj de la konstanta internacia vetarmado.

Sen sekurita paco, la homaro neniam povas farti pli bone! Tial ni ĉiam kaj ĉie laŭte voku: f o r l a a r m i l o j n!

Malriĉigante la malamikojn, ni ja mem malriĉiĝos. Kiam hodiaŭ ni venkas, morgaŭ jam ni estos venkitaj. Ni ja ne povas ŝovi ĉiun ŝtaton al la maro, por ke ĝia komerco estu pli akcelata. Ne eblas, ke ĉiuj popoloj okupas riĉan landon. Aŭ ĉu ni ĉiuj volas paroli saman lingvon? Ĉu ĉiu ŝtato povas superregi la alian? Ĉu estas eble ke ĉiu ŝtato havu la plej grandan aerŝiparon aŭ la plej multajn komercajn aŭ militajn ŝipojn sur la maro? Kion alportis al ni la vetarmado inter preskaŭ ĉiuj ŝtatoj? Ĉu vere sekuritan vivon ĉe nia laborado kaj inter nia familio? Ho ne, nur ĝeneralan mizeron tutmondan.

Tiun mizeron pleje devas senti la popolamasoj, kiuj ĉiurimede estas instigataj al la milito unu kontraŭ la alian. Jes, instigataj, ĉar la popoloj ĝenerale ne estas malamikaj unuj kontraŭ la aliaj. Nur per malbona kaj malvera instruado, per agitaj artikoloj en la gazetaro aŭ per tiaj paroladoj en la radio estas lerte kreata la malkonkordo inter la nacioj.

Estante patrioto mi volus gardi mian patrujon antaŭ la fatala kub-ludo de milito. Vi estas internaciulo, sekve ankaŭ vi ne povas havi intereson pri milito. Mi estas kredema kristano, tial al mi estas malpermesata la rabo kaj mortigo de mia proksimulo. Vi estas liberpensulo, do via ĉielo estas la tero; tamen milito ĝin faras infero. La

idealisto neniam povas aprobi militon pro moralaj motivoj, la materialisto ne pro ekonomiaj konsideroj. La socialisto konas la militon kiel detruanton de pli bona socia ordo. La kapitalisto ankaŭ povas perdi ĉion per milito kaj krom tio ĝi plimultigas la amasojn de la socialistoj. La kleruloj abomenas la militon kiel hontigan stultaĵon, kiel restaĵon el la tempo de l' barbareco. La malkleruloj ŝatas por sia persono kontentigan ekzisteblecon kaj trankvilon. Mi jam estas maljuna kaj sopiras la pacon sentante, ke la popolamasoj ĉie estas pacamaj kaj neniam per milito povas profiti. La junaj homoj estas senzorgaj kaj ne pensemaj, sed per siaj bonaj koroj ili amas la tutan mondon. Nur per instigo kaj malklerigo ili lernas la popol-malamon.

La respublikano malamas la militon, ĉar ĝi povus instali monarkon. La monarkistoj devas timi militon, ĉar okazis jam, ke poste renversiĝis tronoj. La naciistoj devus eviti militon, kiu povas sekvigi malutilon al ilia popolo. Ankaŭ la artistoj ne povas ŝati la militon, ĉar ĝi malriĉigas la popolojn kaj pro tio ili poste serĉas panon, sed ne arton. Vi kampuloj, kion povus utili milito al vi, kiu ĝenas kaj tute ruinigas la fruktojn de via laboro? Vi kuracistoj havas sufiĉe da malsanuloj kaj vi certe pensas pri la multegaj vunditoj, pri la infektitoj, tuberkulozuloj k. c. kiujn produktas kaj plimultigas ĉiu milito. Vi pastroj de ĉiuj konfesioj, vi pro religiaj motivoj tute ne ŝatas militon, la ruiniganton de ĉiu moralo kaj feliĉo. Ankaŭ vi instruistoj ne povas deziri militon pro la samaj kaŭzoj. Kaj vi patroj, ĉu vi intence volas oferi la vivon kaj sanon de viaj amataj filoj al la militmonstro? Vi amantaj patrinoj sur la tuta tero, kial vi ne kuniĝis jam de longe en la batalo kontraŭ la milito, kiu ekstermas viajn infanojn plej amatajn, dolore naskitajn el via patrina korpo?

Estas ja certe, ke la plimulto de la homaro volas la p a c o n. Sed kial ni ankoraŭ ne havas ĝin? Ĉar ni estas tiurilate tro silentaj. Ni devas postuli la pacon pli laŭte, konstante, kaj amase aliĝi kaj aktive kunlaboradi ankaŭ en la pac-societoj, ĉar la unuopulo ne povas atingi multon kaj lia voĉo estas preteraŭdata. Tamen la paco ne venos jam en la venonta jaro, sed se vi nenion faros p o r ĝi, ĝi venos n e n i a m kaj la mizero restos por ni kaj niaj posteuloj.

Se ĉiuj homoj obeus la ordonojn de Dio, precipe tiujn pri la amo al niaj proksimuloj, tiam ni baldaŭ havus la sopiritan daŭran pacon.

Lud. Demal.

De Kanado — tra Usono — al Australio

Kritikaj observoj de vojaĝanta Esperantisto

De **Herbert Koppel**

Junio 1948

Eŭropa Esperantisto baldaŭ ekkonas sur la amerika kontinento, ke la cirkonstancoj por nia movado estas tute aliaj ol en Eŭropo. Ne nur estas fakto, ke la plimulto scipovas la anglan lingvon, sed la homoj, eĉ la Esperantistoj, ŝajne estas aliaj.

Antaŭ 6 jaroj mi alvenis en Montrealo, la plej granda urbo Kanada. Kiel kutime mi tuj turnis min al la loka delegito per letero. En Eŭropo delegito vizitus min post 2—3 tagoj aŭ almenaŭ respondus afable. En Montrealo pasis 2 semajnoj, neniu respondis. En dua letero mi kritike diris, ke mi estas surprizita, ĉar la loka delegito tiel „aktive" laboras, ke li eĉ ne respondas. En sia respondo s-ano P. diris, ke mi ankoraŭ ne konas Kanadon kaj kiam mi estus iomete malpli kritikema, li volonte babilus kun mi Esperante. Sed dum kvar jaroj mi neniam vidis tiun „delegiton!"

La Kanada Esperantomovado preskaŭ mortis. „Tro okupata kun registaraj aferoj", ĉiam diras s-ano Pook (Ottawa), la iama sekretario de Kanada Esperanto-Asocio. „Ni transdonis ĉiujn funkciojn kaj agadon al Nov-Jorko" respondis s-ano Bengough (Hamilton), la iama honora prezidanto de KEA. Tamen, ges-anoj Kaelble (iama Freiburgano), Hackett kaj f-ino Latimer obstine daŭrigas klubon en Toronto. Helpe de s-ano G. Clajton la skribinto fondis klubon en Galt. Pastro Fairbairn propagandas en sia kampo kaj kelkaj izoluloj en la okcidenta provinco de Brita Kolumbio.

Intertempe mi fariĝis brita civitano kaj forlasis Kanadon por veturi Aŭstralion. Bonega okazo travojaĝi Usonon kaj survoje studi nian movadon. Mia unua stacio estas Nov-Jorko, la plej granda urbo de la mondo.

Mi vizitis s-anon Connor, sekretarion de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, kaj lian ĉarman edzinon Doris, unu el la plej bonaj Cseh-instruistoj de la mondo. Ili ambaŭ certe multege laboras por Esperanto. Mi rakontis al li pri la sukcesoj de la Aŭstria Esperantista Federacio (mi estas iama Aŭstriano) kaj atentigis lin, ke tiu sukceso nur estas la rezulto de modela kooperativa laboro de aro da funkciuloj diverspartiaj.

Mi diris, ke oni ne povas gvidi Esperantomovadon de Nov-Jorka loĝejo sen sisteme organizi kursojn kaj lokajn grupojn, la bazo de nia movado! Tio ja estas la plej granda eraro de la nuntempa usona

E-movado. Same mi atentigis lin, ke „Amerika Esperantisto“ ne plu estas redaktata laŭ la „interna ideo“, sed fariĝis nura organo en la lingvo Esperanto. En granda lando unulingva oni nur povas sukcesi, se oni varbas inter homoj interesataj en internacia frateco.

Kelkajn tagojn poste Kalifornianoj plendas al mi pri la „diktatoreto“ Connor, kiu volas simple plenumi ĉiun postenon, kiun oni povas elpensi kaj malaprobas ĉiun laboron faritan de alia s-ano. Laŭŝajne li volas esti salajrata sekretario, sed 800 membra organizo ne povas subteni pagatan sekretarion. „Fondu tra la tuta Usono klubojn kaj kursojn, ne nur por la lingvo Esperanto, sed gvidataj laŭ la „interna ideo“, tiam vi certe sukcesos kaj baldaŭ havos vian centran oficejon“, mi finis nian konversacion.

S-ano Ralph R. Bonesper estas la Nov-Jorka SAT-peranto kaj mia dua vizito estas ĉe li. Li multe laboras por Esperanto praktikmaniere kaj montras al mi longan liston de nutraĵ-paketoj forsenditaj al Eŭropo; valore de mil dolaroj, grandparte kolektitaj de la tutmonda SAT-anaro. Sed li mem propramone forsendis multajn paketojn.. Vere, en tiu ĉi modesta unuĉambra Nov-Jorka loĝejo regas „la interna ideo!“

Venontvespere mi trovas vere samideanan atmosferon. En granda ĉambro kunvenis proks. 30 ges-anoj en internacia rondo: Iama Franco Lavallee gvidas la komencantojn; iama Germano Schatz (el Hamburg) lerte instruas la progresintojn. Mi interkontaktiĝas kun Rumano, pola dentistino, Bulgarino kaj juna Svedino. SAT-peranto Bonesper ankaŭ ĉeestas. Tro rapide la tempo forflugas kaj adiaŭante s-ano Schatz skribas jenajn vortojn en mian vojaĝlibron: „Mi ĝojas renkonti perfekte parolantan Esperantiston kaj pere de vi mi salutas la E-istojn en la malproksima Aŭstralio, precipe la ŝatatan redaktiston Banham. Kiel vojaĝemulo mi deziras akompani vin . . .“

La delegita servo estas unu el la plej gravaj de nia movado kaj la laŭorda plenumo estu la honoro de ĉiu delegito, sed ankaŭ de la centra oficejo de UEA. Tio okazis en Chicago: Mi alvenis posttagmeze. De la YMCA-hotelo mi altelefonas la delegiton, kiun mi informis aerpoŝte pri mia alveno jam 10 tagojn antaŭe petante lin, ke li ankaŭ informu la vicdelegiton kaj la fakdelegiton Knapp. La nevino de la delegito estas ĉe la telefono, sed mi devas paroli angle. Mi pensas, kion faras eksterlanda s-ano, kiu ne scias la anglan lingvon? Ŝi diras al mi, ke ŝia onklo ricevis mian leteron, sed ŝi devas atentigi min, ke ŝia onklo jam estas 83 jara, kripligita, ne povas forlasi la liton kaj tial ne povas telefone paroli kun mi, tamen ŝi invitas min viziti ilin hejme. Mi jam volas akcepti la inviton, sed ŝi informis min pri jeno: „Mi devas ankaŭ atentigi vin, ke kvankam mia onklo scipovas legi Esperanton, li nur malbone parolas ĝin kaj ĉar li ne bone aŭdas, vi devas kriege paroli kun li“. Nature mi rezignis la inviton sub tiaj cirkonstancoj.

Mi do altelefonas la vicdelegiton. Lia patrino respondas anglalingve. La delegito ne estas hejme, sed mi povus renkonti lin morgaŭ posttagmeze. Mi atentigas la patrinon, ke mi jam forvojaĝos tagmeze kaj tial volus paroli kun li antaŭe. Tio ne estas ebla, ŝi finas la konversacion, ne klarigante kial la delegito ne havas tempon. Mi do provas atingi la fakdelegiton Knapp. Fine mi sukcesas kaj s-ano Knapp savas la honoron de la Chicago-aj delegitoj. Venontmatene li invitas min en sian oficejon. Mi renkontas vere bonkoran homon, jam grizharan, sed tre aktivan s-anon. Alois Knapp, fakdelegito por leĝo kaj nudismo, venis Usono-n antaŭ 37 jaroj el Aŭstrio. Li estas advokato. Multfoje li provis organizi E-klubon, sed vane, la ges-anoj ĉiam havas aliajn elturniĝojn. Unuhora konversacio rapide pasis kaj adiaŭante li enskribis en mian vojaĝlibron: „Mi ĝojas koni Esperantiston, naskitan en Aŭstrio. Mi mem naskiĝis en Aŭstrio kaj estas en Usono depost 1911. Bonan ŝancon al vi en Aŭstralio!"

*

Vere s-ana bonveno atendas min en San Francisco. S-anino Helene Wolff, iama Germanino (el Kleve) estas bonega reprezentantino de nia ideo en Kalifornio. Ŝi ne nur bone parolas Esperanton, sed ŝi ĉiutage praktikas la Esperantismon. Kvankam neriĉulino, ŝi regule sendas paketojn al suferantaj eŭropaj s-anoj, fondis E-grupon sub malfacilaj cirkonstancoj, parolis pri Esperanto ĉe la UNESCO-konferenco ktp. Ofte ŝi parolis pri nia movado en „Servo-Kluboj" kiel Rotary, Kiwanies k. a. Afable ŝi gvidis min tra la urbo kaj montris kaj klarigis al mi multajn vidindaĵojn. En mian vojaĝlibron f-ino Wolff inter alie enskribis: „Ĉu ekzistas pli bela vorto ol samideano? Ĉu ekzistas pli granda ĝojo ol renkonti homon, kiu estas vera sam-ide-ano?"

Trans San Francisco Bay mi veturas per elektra tramo al Berkeley kaj Oakland por tie viziti s-anojn. La kaliforniaj s-anoj raportas al mi pri la bedaŭrinda stato de la usona movado. Ili plendas, ke la kaŭzo estas la „diktatoreco" de la sekretario de EANA, kiu simple volas esti ĉio: sekretario, ĉefredaktoro de AE, fakte enkasigas ĉiun monon, estas la sola libro-vendanto, gazetar-propagandisto ktp. Se li malsaniĝas la tuta organizo nature ne povas funkcii. De Kalifornio al Nov-Jorko estas 5000 km kaj tio treege malhelpas la propagandon. Tial ili komencis eldoni la „Verda Marbordo Pacifiko-n" kiel interligilon. Pro tio ili ricevas de s-ano Connor kalumniajn leterojn, skribitajn anglalingve. Tial oni demandas min, ĉu Connor ne scipovas Esperanton, sed mi certigas al ili, ke mi havis kun li konversacion nur per Esperanto. Pro la malproksimeco la s-anoj proponis libro-peranton por ĉiu ŝtato, sed tion ne konsentis s-ano Connor. Ili nun aĉetas librojn de la „Libro-Servo" en Fall Brook (Kalifornio). Libro-mendoj en Fall Brook estas

plenumitaj post 2 tagoj, de Nov-Jorko en 14 tagoj kaj pli malfrue. Oni rakontas al mi ankaŭ, ĉar „Heroldo de Esperanto“ vendis librojn ankaŭ al la Libro-Servo en Fall Brook, s-ano Connor ne plu volas aĉeti librojn el tiu grava eldonejo. Estas ŝajne necese, ke la estraro de EANA pritraktu la aferon, ĉar la Esperanto-movado en iu lando ne devas esti la persona ambicio de iu Esperantisto.

Resume mi devas konfesi, ke la E-movado en Usono nuntempe estas malsana. Kultura movado kiel la nia, nur povas sukcesi en komuna laboro de veraj idealistoj. „Superhomo“, kiu povas ĉion plenumi, ne ekzistas!

La katenita Vieno

Ekstrakto el la libro: „Bis der Vorhang fiel“ (ĝis falis la kurteno) de W. Thomas. Kun permeso de la aŭtoro esperantigite de Elsa Peschek, Bochum.

Kiel baldaŭ falis la lastaj maskoj, kiujn oni aplikis ankoraŭ por ne montri al la eksterlando la veran vizaĝon. Sed tiam komenciĝis unu el la plej malhelaj ĉapitroj de la homarhistorio — la judforpeloj el Vieno. En la Prinz Eugen-strato malfermiĝis „loko por hebreaj elmigroj“. Tien oni trenis en fruaj matenhoroj la bedaŭrindulojn, kiujn en la lasta nokto trafis la terura sorto. De tie komenciĝis la vojo al la kolektkampoj.

Tie regis ankaŭ la fihomo, kies nomon tiuj perditoj parolis riske nur kun tremo. Viro, al kiu eĉ tiuj teruroj ne impresis, kiu staris ekstere de sia terura potenco: B r u n n e r.

En tiu ĉi periodo venis multaj helppetegantoj al mi. Pleje Vienaj artistoj, kiuj timis pri siaj edzinoj. Kaj ĉiam ree la sama rigardo, ĉiam ree la samaj vortoj: „Helpu al ni. Ni estas perditaj, se vi ne helpos nin!“

Aperis krom nekonatuloj kelkaj famaj artistoj. Tiel sidis iutage antaŭ mi la plej neforgesebla patrino-prezentantino de la germana filmo, Frieda Richard. Ŝi timis pri sia filino, kiu vivis en Sud-Francujo, sed nun estis arestita de la SS. Aperis nia per sia stranga, ĝis la drasta klaŭno antaŭenpelita komikisto Theo Lingen. Ankaŭ Hans Moser, tiu ĉi mizantropa „Nuschler“ (netradukebla germanismo), kiu per la filmo diskonigis la antaŭurban Vienismon. La edzinoj de ambaŭ estis koncentrigitaj pro la Nürnbergaj malhonorleĝoj.

Tiel fariĝis mia servoĉambro, tra kies fenestro la Vieno de la humanista periodo ensalutis, la scenejo de kortuŝanta mizero. „Vi povas malhelpi“, diris mia patreca amiko, kiam mi turnis min telefone al li pro mia senkonsiliĝo. „Vi povas malhelpi, vi povas helpi.“ Kaj ĉiutage

mi aŭdis la saman de ĉiuj malsupren premitoj kaj ofenditoj, kiuj kunvenis en mia antaŭĉambro. Sed kion povis fari unuopulo kontraŭ la timiga maŝinaro, ekfunkciigita por la detruado de centmiloj, kiuj havis nenian kulpŝarĝon krom tio, ke ili ne apartenis al tiu raso, kiu per freneza savinstruo arogis al si, ke ĝi savos per sango kaj murdo la mondon el ĝiaj humanaj eraroj. Laŭ kiuj leĝoj funkciis la maŝino? Kiu deĵoris ĉe la leviloj? Kiu povis devigi ĝin al stagnacio? —

Hazarde mi konis la likvidiston Brunner kaj eniris iutage en la „lokon por hebreaj elmigroj" en la Prinz Eugen-strato. Post kiam mi estis trapasinta la insistan kontrolon per la pordisto, mi renkontis neniun en la domego, ĝis fermiĝis malantaŭ mi la pordo de la antaŭĉambro.

Sinjoro Brunner min lasis atendi kelkan tempon, ĝis li min envenigis. Malantaŭe de la skribotablo leviĝis mezgranda homo, ĉe kiu nenio estis rimarkebla, ke lian diablan funkcion ekstere io malkaŝas. Li parolis en Viena dialekto kaj min akceptis per mikso de troa ataŭleco kaj ironio.

„Eksidu", li petas. „Kion vi deziras? Ni ne migradas sur la altaĵoj de la homaro kiel la sinjoroj artistoj, kun kiuj vi ĝenerale interrilatas. La afero de ni estas pli . . . realisma."

Pikanta rigardo de liaj okuloj tuŝis mian vizaĝon. Mi ektimiĝis pro la rigardo. De tiu homo mi nenion esperis.

„Mi venis", mi komencis hezitante, „paroli kun vi pri la traktado de la hebreaj artistoj, kiuj de pli frue havas meritojn por la kulturo de Vieno kaj pro tio ĝuas la respekton de la enloĝantaro . . ." —

Brunner ne respondis. Anstataŭe li ekprenis ion sur la rando de sia skribotablo. Pro la signo eniris viro same vestita en civilo, al kiu li alvokis la vorton „diktato". Li tuj sidiĝis ĉe tableto kaj prenis stenografpaperon.

„Ĉu vi volus ripeti ankoraŭfoje, kion vi diris?" — Mi ripetis la frazon, kiu estis skribata tuj stenografie.

„Mi devas konfesi, ke vi penadas precipe por tiuj homoj. Kelkaj peticioj, kiuj estis direktataj al ni pro ĉi tio, estis subskribitaj de vi. Tiu afero efikis en mia oficejo la koncepton, ke vi estas judamiko."

La lasta vorto estis parolita mallaŭte, sed per subtono mordanta. Brunner klinis la kapon. Li rigardis min de malsupre supren. Mi serĉis kaŝi mian konfuzon kaj volis ion respondi, sed Brunner daŭrigis: „Ni ne povas fari esceptojn. Judo estas judo — kaj la tielnomitaj meritplenaj judoj estas la plej malbonaj. Mi ankaŭ ne devas plenumi decidojn, sed mi realigas nur ordonojn. Kaj tia ordono estas, ke ĝis decidita templimo neniu judo plu rajtas esti en Vieno. Kontraŭ tio ne ekzistas riproĉo, eĉ se rekomendojn donus la regna provincestro, tio ne helpus. Mi substaras al neniu estraro, ankaŭ ne al Schirach. Li povas

disponi, kion li volas — iutage tamen estos for viaj protektitoj kaj neniu havas la potencon ilin repreni. Ankaŭ ne mi.“

„Mi scias el Berlino, ke estas eldonitaj apartaj decidoj.Ekzemple oni ŝirmas virinojn, famajn artistojn kaj sciencistojn kontraŭ la ekzilado.“

„Kio valoras en Berlino al mi estas indiferenta. Ni estas ĉi tie en Vieno kaj mia komisio ne konas iun escepton.“

Kontraŭ tiu malamo mi ne povis sukcesi. Malgraŭ la antipatio, kiu ekestis en mi, mi devis diri la lastan demandon: „Kiun vojon mi devas iri por atingi en unuopaj kazoj apartan regulon . . .?“ —

Sed nun kovris por sekundo ridaĉo la vizaĝon de Brunner. Vastatone kaj malrapide, kun sentebla amuzo pri siaj vortoj, li respondis: „Ĉiuj ĉi demandoj de tia speco iras nur trans mi. Se vi ilin sendus al aliaj estraroj, ili asignos ilin nur al mi. Superordigitaj oficejoj ne ekzistas. Ni estas vera estraro, sed de aparte propra strukturo. Sekve vi ŝparas afrankon kaj tempon, se vi turnos vin kun viaj protektproponoj rekte al mi . . .!“

La vortoj estis plenaj de insulto. Mi estus volinta bati en la vizaĝon de mia kontraŭulo per la pugno.

„Mi kredas scii“, mi diris, dume mi havis penon eldiri vorton trans miaj lipoj —, „mi kredas scii, ke la regna provincestro en apartaj kazoj povas doni la eblecon, — estu pro politikaj aŭ aliaj kaŭzoj — aldemandoj pri libereco aŭ provizora nepostulo de la ekzilado ĉe via plej supera ĉefo. Ĝis la decido la koncerna pritrakto estas lasata al la urbo . . .“

La okuloj de mia kontraŭulo estis nur ankoraŭ malvastaj fendoj, el kiuj li rigardis min kun malvualita malamikeco.

„Ĉiu distriktestro aŭ regna provincestro sin gardos en la okuloj de l' regnestro por eviti tiajn konfliktojn. Lasu vi de tio la fingrojn. Tio estas danĝera afero. Ĉu la sinjoroj artistoj disiĝos morgaŭ aŭ post duona jaro de siaj edzinoj — iutage ĝi okazos. Malgraŭ viaj penoj . . . Sekvu mian konsilon. Vi povas nenion aliigi. Vi povas vin mem meti nur en tre duban lumon.“ —

Brunner ekstaris. Malespere serĉante taŭgan frazon, per kiu mi povis adiaŭi, mi balbutis ion tre frenezan: „Mi dankas al vi pro via informo.“

Jam en la pordo mi aŭdis ankoraŭ, kion Brunner vokis al mi en tranĉanta insulto: „Tute ne dankinde, volonte farite.“ —

ESPERANTO-MONDADO en Aŭstrio

Raporto pri la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz

De la 12-a ĝis la 15-a de Aŭgusto okazis en Linz la dua Aŭstria Esperantokongreso post la milito. Partoprenis ĉirkaŭ 300 gesamideanoj el ĉiuj federaciaj landoj kaj kelkaj Esperantistoj el Anglujo, Holando kaj Germanujo.

En la flagornamita kongresejo (Theresien-salonego de la hotelo Reiter) okazis vespere, la 12-an de Aŭgusto, la malferma kunsido. Post enkondukaj bonvenaj vortoj de la estro de la L. K. K., s-ano Karl Nigl, salutis la A. E. F.-prezidanto, s-ano dir. P. Glüxmann la ges-anojn kaj gastojn. Sekvis laŭtlego de la multnombraj salutleteroj de aŭstriaj aŭtoritatuloj, inter alie de la ŝtata kanceliero d-ro inĝ. Figl. La landestro de Supra Aŭstrio s-o dro. Gleissner transdonis en koraj vortoj la salutojn de la lando Supra-Aŭstrio. Li tute konsentis la aspirojn de nia movado kaj nomis Esperanton sprite „anti-dinamito", per kiu oni nun devus rekonstrui la detruitajn pontojn inter la popoloj. Li promesis al la movado la plej eblan helpon kaj subtenon de la landa registaro. Poste parolis la vic-urbestro s-ro Mitterbauer nome de la malhelpita urbestro s-ro dro Koref kaj de la gast-urbo Linz. Plue salutis la kongreson la direktoro de la ŝtataj fervojoj inĝ. Hofek kaj por la ne alveninta ĝeneral-direktoro de aŭstria poŝto d-ro Dworschak, s-ano Kalk. kons. Frey. La kongresan ĉef-paroladon faris nia eminenta s-ano eksministro d-ro Frenzel. Nome de la eksterlandanoj parolis s-ano Kriis-Nederlando kaj s-anino Such, Anglujo. Sekvis muzikaĵoj, kantoj kaj deklamoj.

La 13-an de Aŭg. okazis diversloke fakaj kunsidoj de UEA-anoj, instruistoj, poŝtistoj, fervojistoj kaj naturamikoj, kaj frakciaj kunvenoj de katolikaj kaj laboristaj ges-anoj. La instruistoj fondis fakan sekcion en la kadro de Aŭstria Esperantista Federacio kun la centro en Salzburg, kie nuntempe estas la plej multaj aktivaj Esperanto-instruistoj. La laboristoj decidis pli aktive varbadi en la laboristaj partioj, aparte en SPOe kaj KPOe. La katolikoj varbas speciale inter la ekleziuloj. Ĉio tio okazas sen politika kontraŭeco, ĉar la Aŭstria Esperantista Federacio estas superpartia organizo, en kiu la reprezentantoj de ĉiuj mondrigardoj harmonie kunlaboras por unu komuna celo, la interfratiĝo de la popoloj.

Posttagmeze okazis en la kongresejo la ĝeneral-kunveno de la „Aŭstria Societo de Amikoj de Esperanto", societo, celanta atentigi vastajn rondojn de la aŭstria publiko al Esp-o, varbante por ĝia enkonduko en la lernejojn kaj por la homaranaj celoj de Esp-o. Societa prezidanto fariĝis ree s-ano d-ro Maximilian Führing, sekcia konsilisto de la instru-ministerio. Sekvis kunveno de la „Aŭstria Esperanto-Instituto" kun ĉef-referaĵo de s-ano prof. d-ro Sirk pri „Ĉapitro el la historio de Esperanto". Vespere estis aranĝita festo kun seriozaj kaj distraj prezentaĵoj kaj ludo de teatraĵeto de ges-anoj el Salzburg.

La 14-an de Aŭg. okazis antaŭ-kaj posttagmeze „ĝenerala kunveno de Aŭstria Esperantista Federacio". En ĝi ĉiuj raportoj pri la pasinta jaro de la movado estis faritaj kaj aklame akceptataj. La ĝisnuna prezidanto dir. Glüxmann povis fiere konstati, ke ni atingis konsiderindajn sukcesojn kaj ke la Aŭstria registaro protektas nian Asocion; ĝi helpis jam per permeso de instruado en la lernejoj, starigo de ŝtataj ekzamenkomisionoj, permesoj de vojaĝoj eksterlanden kaj en ĉia maniero. Jus estis instalita nova Esp.-lektorato ĉe la universitato en Innsbruck (lektoro d-ro Leo Blaas) kaj nova ekzamenkomisiono en Salzburg.

La plej bona propagando okazis en Tirol per s-ano Hans Steiner. La kongreso aŭdis la raporton de la aŭstriaj delegacioj ĉe la Danubregiona konferenco en Budapest kaj ĉe la Universala Esp.-Kongreso en Malmö kaj aprobis la sintenon de la delegitoj. Poste okazis la reelektoj. Prezidanto de la AEF fariĝis nia malnova samideano eksministro d-ro Frenzel, nun viceprezidanto de la Supera ŝtata revizejo (Kalkulkortumo). Post la elekto eksministro Frenzel faris mallongan, sed gravan paroladon, dirante, ke li ŝatas la honoron, esti elektita prezidanto de la AEF ĝuste en la kongreso en sia hejmurbo Linz, kie li lernis Esperanton antaŭ 29 jaroj. Kiel programon li diris: „Ni esperantistoj ĉiudirektaj amas la pacon, liberecon kaj toleremon, kaj ni kredas je la saviĝo el la malbeno Babilonia per Esperanto." Kaj li promesis, ke li kiel prezidanto de superpartia organizo plenumos sian funkcion en severa senpartieco. Granda aplaŭdo dankis liajn vortojn.

Kiel vicprezidantoj estis elektitaj dir. Glüxmann, sekcia konsilisto d-ro Führing kaj mag. kons. d-ro Grimme, afergvidanto sam-ano kalk.-kons. Cech. Kiel honora prezidanto de AEF estis elektita s-ano ĝen. poŝtdirektoro d-ro Dworschak, vicprezidanto de ILEPTO. La nova estraro decidis en sia laborprogramo interalie fondi internacian feriejon en Tirol kaj aranĝi la venontjaran Aŭstrian Esp.-Kongreson en Graz.

Posttagmeze en la festsalonego de la Linza urbdomo okazis la plej interesa (germanlingva) parolado de la kongreso, prelego de d-ro inĝ. Eugen Wüster, famkonata scienculo pri internacia normigo kaj esplorado de planlingvoj, pri la temo „La stato de la Esp.-movado kaj la internaciigo de la terminaroj". En tiu ĉi prelego d-ro Wüster raportis pri la ĝisnunaj sciencaj laboroj celantaj konstati la internacie valoran lingvan materialon, precipe pri la laboroj de IALA (International Auxiliary Language Association) kaj ISO (Internacia Normig-Komitato) kaj komparis la ŝancojn de la naturalistaj sistemoj (kiel ekz. Occidental) kun tiuj de la skemaj sistemoj, al kiuj apartenas Esperanto. La internaciaj normsistemoj kaj la naturalistaj helplingvoj servas ĉefe nur por skriba interkompreniĝo, dum sole Esperanto praktike servas kiel p a r o l a t a helplingvo internacia.

Vespere okazis bonvizitita balfesto.

Dimanĉon antaŭtagmeze unue okazis katolika Diservo kun Esperanto-prediko de pastro Kaps el Salzburg farata tute laŭ la Interna ideo de Esperanto. Poste parolis en la Urbdoma salono sekcia konsilisto d-ro Führing pri „Mondlingvo — revo de l' homaro" (en germana lingvo) kaj fine la prezidanto de la germana Esp.-Asocio d-ro Ziegler, Esp.-lektoro ĉe la universitato de Munheno kore salutparolis kaj raportis pri la sukcesoj de la postmilita movado en Germanujo, kie la esperantistoj laboras sub similaj cirkonstancoj kiel en Aŭstrio.

La adiaŭan kaj dankan parolon faris s-ano AEF-vicprezidanto dir Glüxmann, finante la sukcesan kongreson, kiu bedaŭrinde ne estis favorata de la vetero. Sed en la lasta tago ankaŭ la vetero sereniĝis kaj la kongreso finiĝis per ekskurso sur la Pöstling-monton je ĉies kontentiĝo.

Esperanto en la popollernejo de Rettenschöss

S-ro ĉefinstruisto Ambros S t ö c k l, Rettenschöss ĉe Kufstein, gvidas E-kurson por 12—14 j. lernantoj, kiuj vigle kaj ĝoje lernas la lingvon. Eĉ dum la ferioj li daŭrigis la kurson.

364 km — marŝo por lerni Esperanton — Pasintaŭtune s-ro ĉefinstruisto Ambros Stöckl vizitis E-kurson en Kufstein kaj por povi partopreni li devis ĉiun kursvesperon iri al la kursejo tien kaj reen 26 km, ĉar trafikiloj ne estis je lia dispono. La kurso daŭris 14 vesperojn, tiel ke s-ro ĉefinstruisto Stöckl devis piediri entute 364 km por lerni Esperanton.

Kiu povas aserti, ke li montris kaj pruvis pli da intereso kaj entuziasmo por la lingvo internacia? Se ni havus sufiĉan nombron da tiaj entuziasmaj

kaj oferemaj instruistoj en Aŭstrio kaj alilande, ni povus esti feliĉaj kaj rigardi esperplene en la estontecon. Tial s-ro Stöckl vere meritas ke ni en la en- kaj eksterlando agnosku lian fervoron kaj danke sendu gratulkarton al: ĉefinstruisto Ambros Stöckl, popollernejo en Rettenschöss, ĉe Kufstein, Tirol, Aŭstrio.

Tirol komunikas ĝojigajn raportojn

La landa lernejinspektoro, s-ro d-ro Mumelter, konigis al la landestro de AEF por Tirol, s-ano Hans Steiner, la pretecon starigi oficialan komision pri la ŝtata Esperanto-ekzameno kaj petis informojn pri eknomotaj taŭgaj ekzamenontoj.

Laŭ komuniko de la polica direkcio de Innsbruck jam 30 policanoj anoncis sin por E-kurso aŭtune. Tio estas la sukceso de petskribo al la nomita direkcio pro permeso fari propagandon pri Esperanto inter la policistaro.

Okaze de la Esperantista renkontiĝo ĉe la Berglsteinersee proksime de Kramsach (4. 7. 1948), la funkciuloj de la E-grupoj en aparta priparolado diskutis la aferojn de propagando, aŭtunaj kursoj k. s. aferojn. Pri la renkontiĝo raportis kelkaj gazetoj kiel: „Tiroler Nachrichten", „Volkszeitung", „Sonntagspost" (Kufstein) k. a.

Al ĉiuj popol- kaj ĉeflernejoj same al ĉiuj pli altgradaj lernejoj de Tirol kaj Vorarlberg estis propagandcele sendataj entute 1000 cirkuleroj kun varbartikolo pri Esperanto.

E-Klubo Solbad Hall, Tirol — La aktivecon de la klubo en Hall (estro K. Koller, Thurnfeldstr. 4) pruvis la klubvespero la 2. 6. 1948, kiun partoprenis pli ol 30 personoj, inter ili gastoj el Parizo, Innsbruck, Wattens kaj Kirchbichl. S-ano H. Steiner donis E-lingvan raporton pri la unua germana E-kongreso postmilita pentekoste en München. La klubejo troviĝas en belega ĉambro de la knabina ĉeflernejo, kies direktorino mem estas entuziasma Esperantistino kaj krome la ŝatata „patrino" de la klubo.

Lerneja konsilantaro de Knittelfeld por Esperanto

En la kunsido de la konsilantaro de la lerneja distrikto en Knittelfeld, N.-Ö., la 7. 7. 1948, proponis s-ano d-ro Adolf Halbedl la sekvantan unuanime akceptitan proponon:

Pro la akcelado de la pacamo de plej vastaj rangoj de la popolo kaj de ĝia plej konkreta efektivigo; pro la intensivigo de la fremdultrafiko per mondampleksa kaj plej malmultekosta varbado kaj plej laŭebla kontaktigo de la vizitontoj kun la loĝantaro enlanda; pro la atingeblo de la vasta mondo precipe por la kampularo, la instruistaro de la lerneja distrikto Knittelfeld estas tre instigata, interesiĝi pri senco kaj celo de la Esperanto-movado, mem lerni la mondhelplingvon Esperanto kaj entrepreni la ŝtatan ekzameniĝon pri la kapableco ĉi tiun lingvon instrui en siaj lernejoj.

Popola Altlernejo de Salzburg akceptis Esperanton en sian instruplanon por la du semestroj 1948/49. Porkomencanta kurso komenciĝos la 4. 10. 1948. Gvidanto estas nia ŝatata kunlaboranto en AEF, instruisto Franz Fötinger.

Esperanto en la ĉeflernejo de Saalfelden

Nia kara kaj tre agema s-anino, ĉeflernejinstruistino Lisl Oberlechner, sendis al ni mallongan, sed despli gravan kaj ĝojigan komunikon:

Mi per kelkaj vortoj volas raporti pri niaj sukcesoj rilate Esperanton en la ĉeflernejo de Saalfelden. Dudek geknaboj de la 4-a klaso de l' ĉeflernejo studis la lingvon dum la pasinta lernjaro, ĉar mi donis al ili senpagajn lecionojn. Gojegon faris al ili la korespondado kun la eksterlando. Venis multaj leteroj el diversaj landoj, eĉ el Ĉinujo. Parto el la gelernantoj daŭrigantaj la studadon el la ĉeflernejo jam demandis min pri nova kurso, kion mi promesis. Aliaj, kiuj iros al Salzburg, promesis al mi, ke ili tie klopodos daŭrigi la lernadon de Esperanto, se eblas en la tiea lernejo.

Pri la lernsukceso mi disdonis al la geknaboj atestojn, kiuj ankaŭ estis subskribitaj de la s-ro ĉeflernej-direktoro s-ano Wallinger, pri kio ili estis tre fieraj. S-ro lernej-konsilanto Wallinger kaj mi klopodos pri oficiala enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo. Espereble ni sukcesos starigi apartan E-klason en la nova instrujaro.

Rimsaluto el Galt, Kanado, al Aŭstria E-Revuo

Transe de la granda maro,
Malproksime en Kanado,
La „Revuon" daŭre studas
Ge-Galt-anoj kaj salutas!

Rimark. de la red.: Danke ni akceptis tiujn salutojn. Gojante, ke nia Revuo trovas plaĉon eĉ en tiu fora terparto, ni kore respondas la salutojn kaj deziras al la E-grupo en Galt prosperon kaj sukceson.

E-grupo „Fonto" — Felixdorf, N.-Ö. La 16. 5. 1948 okazis la ĉefkunveno de la grupo, en kiu post diversaj raportoj estis elektata la nova estraro. Estro: Patek Robert; sekretariino: Anna Jung; kasisto: Franke Emmerich; kontrolo: Josef Kolb kaj Fr. Schilling.

Malgraŭ diversaj malhelpoj la grupo klopodas varbi en Felixdorf kaj ĉirkaŭaĵo novajn adeptojn por nia ideo kaj preparas la agadon por aŭtuno.

E-societo „Unueco" — Graz. La 14. 6. 1948 okazis la ĉefkunveno de la societo. S-ano Podrepschek raportis pri la agadjaro kaj substrekis la malfacilaĵojn kun kiuj la societo devis lukti pro la malbonaj cirkonstancoj. Tamen pro la firma kuntenado kaj kunlaborado de la s-anoj Podrepschek kaj Eder la aferoj estis majstrataj kaj nun la societo havas 68 aktivajn kaj 5 subtenantajn anojn. Mortis du karaj societanoj: kolonelo Hackl kaj Ludwig Pernegg.

La novelektita estro de „Unueco" estas s-ano Josef Eder kaj vicestro Anton Podrepschek. Aliaj estraranoj estas Gregor Mesaritsch, Rosa Marco, Anton Minauf, ĉefinstruisto Cipl kaj s-ano Kaufmann.

En parolado, farante prognozon pri la E-movado, estro J. Eder akcentis ke ekzistas du gravaj celoj: enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj en la servon de la nacia kaj internacia turismo. Poste sekvis instrua parolado de profesoro s-ano Hainschegg pri lingvaj problemoj de Esperanto. Societadreso: Graz, Sackstr. 16/1. Kunvenejo: Graz, Stempferg. 6/1.

Regiona Esperantista ekskurso

Laŭ propono de s-ano d-ro Sirk el Vieno, kiu pasigis la feriojn en Gmunden, dimanĉe la 22-an estis aranĝata komuna ekskurso al la pejzaĝe tre bele situata ekskursloko „Traunfall" (Akvofalo). Partoprenis gesamideanoj el Wels, Schwanenstadt, Vöcklabruck, Gmunden kaj Ebensee. En amuza, harmonia kunesto oni pasigis kelkajn agrablajn horojn, plifirmigante la reciprokan kontakton kaj samideanan kamaradecon. Max Heissl.

La tria Burgenlanda Esperanto Tago

Ja la 29-a de Aŭgusto 1948 okazis en la ĉarma vilaĝo Stadt Schlaining la tria Burgenlanda Esperantotago. Malgraŭ la malbela vetero partoprenis ĉirkaŭ 300 geesperantistoj kaj geamikoj al Esperanto el Burgenlando. Krome venis gesamideanoj el Wr.-Neustadt, Felixdorf, Wien kaj Linz.

Antaŭtagmeze okazis en ambaŭ preĝejoj diservoj. Monaho Franz Hebenstreit el Graz predikis per belaj vortoj pri la respondeco de Esperantistoj je homeco. Posttagmeze gvidis la kristana pastro la kunvenantojn tra la bela kastelo. Je la 14-a okazis en la kinejo la kunveno, kiu estis malfermata per la kantado de la Esperantohimno. La urbestro salutis la kunvenon kaj la estro de la Burgenlanda Esperanto-Ligo Hans Bauer parolis pri la alta celo de nia ideo. S-ano Katzianka salutis en la nomo de UEA kaj mallonge raportis pri la impreso, dum la 33-a Universala kongreso en Malmö.

S-ano Vokal transdonis la salutojn de la AEF. En sia parolado li trafe raportis pri siaj spertoj, kiujn li ricevis dum multaj vojaĝoj eksterlandaj kaj

pri la granda tasko de nia movado, kunhelpi pacigi la mondon kaj kunhelpi al la kreado de pli feliĉa estonteco.

S-ano Hoditsch invitis la ĉeestantajn Schlaining-anojn, aliĝi al nia movado kaj partopreni al Esperantokurso, gvidota dum la venonta vintro.

Malgranda ekspozicio montris la disvastiĝon kaj la praktikan uzadon de nia lingvo.

Post la kunveno okazis en gastejo amuza kunesto kun dancado kaj kantado. La tago certe alportos bonajn fruktojn, multaj aŭskultantoj de la paroladoj interesiĝis pri nia ideo kaj ni povas esti kontentaj pri la sukceso atingita.

E-grupo „Konkordo" — Wien X. La 25. 5. 1948 okazis la ĝenerala grupkunveno por novelekti la estraron. K-do Hirnich salutis la partoprenantojn kaj raportis pri la grupagado pasintjara. Sekvis raportoj de la kasistino k-dino Zöchling kaj bibliotekistino Hudeček. La balotkomitato prezentis al la kunveno liston de la novelektota estraro. Kun aplaŭdo k-do Joh. Kral estis elektata estro kaj la ĝisnuna estro k-do Albert Hirnich, honora estrarkonsilanto. Ankaŭ la aliaj estraranoj unuanime elektiĝis.

S-ano Eckstein en parolado diris, ke la grupgvidado devas esti en fortaj manoj por certigi sukcesojn. Estro k-do J. Kral petis ĉiujn pri sincera kunlaborado, por ke la anaro sekvontjare duobliĝu. Por ne forgesi la komunan taskon li proklamis por ĉiuj signalvorton: Unu novan membron! Se ĉiu ano varbos novan, tiam la grupo certe prosperos.

Radio-Servo de AEF raportas

La Esperanto-Radio-Servo pritraktis inter Oktobro 1947 kaj Junio 1948 en Radio Wien, RAVAG, jenajn temojn:
Esperantlingve:

Informoj pri la Esperanto-movado 13 dissendoj,
Historio de Esperanto 6 dissendoj,
Interesajoj el Aŭstrio 6 dissendoj,
Literaturo de Esperanto 7 dissendoj,
Sciencaj temoj 4 dissendoj,
Socialaj aferoj 4 dissendoj,
Teknikaj aferoj 3 dissendoj
Ekonomiaj komunikoj 2 dissendoj,
Arto 1 dissendo,
Sporto 1 dissendo,
Fervojistaj aferoj 8 dissendoj,
Germanlingvaj informoj pri Esperanto 8 dissendoj.

Krom tio estis ĉiusemajne disaŭdigata Esperantokurso por komencantoj.

La radioelsendoj en kaj pri Esperanto okazas nuntempe jene: Sendilo Wien II ĉiu ĵaude 18,45—19 h MET per la ondolongoj 228,6, 31,05 kaj 41,81 m.

Skribu vian kontenton kaj dankon pro la akcepto de Esperanto en la radioprogramon al: RAVAG, Wien IV., Argentinierstr. 30 a kaj konatigu viajn sugestojn aŭ sendu taŭgajn manuskriptojn al Radio-servo de AEF, Wien I., Neutorgasse 9.

Grava medicina eltrovo diskonigata per Esperanto

En Aŭstria Esperanto-Revuo n-ro 1—3/1948 pĝ. 22 aperis artikolo titole: Reaktivigo de paralizitaj nervocentroj per trahaŭta traktado per spirfermentoj, de la kuracisto d-ro Otto Zajicek, Wien, kiun plene represis „SAT-Amikaro" sub la titolo: Grava medicina eltrovo.

La Aŭstria Esperanto-Servo (Wien I., Neutorgasse 9) dissendis kelkcent da aparte presitaj flugfolioj al ĵurnaloj, asocioj kaj kuracistaj delegitoj en ĉiuj landoj. „Heroldo de Esperanto" aperigis anoncon pri ĝi. La nomita Esperanto-Servo pro ĉi tiuj artikoloj ricevis ĝis fine de Junio ĉj. 50 alskribaĵoj el 13 landoj. Skribis privatpersonoj kaj kuracistoj, kiuj pri tiu temo interesiĝas kaj kelkaj eĉ volas fondi oksidazosocietojn en siaj landoj. Multaj alskribaĵoj rekte estis senditaj al d-ro Zajicek mem. La ĝisnuna sukceso pere de Esperanto do estas vere kontentiga kaj denove pruvas la internacian utilecon de Esperanto por seriozaj kaj gravaj aferoj.

Diversnaciaj ŝtathimnoj estas serĉataj

Por la kompilo de kolekto, enhavanta la diversnaciajn ŝtathimnojn, mi petas ĉiujn Esperanto-organizojn aŭ Esperantistojn en tutmondo sendi al mi:

1. La kantnotojn de la resp. ŝtathimno,
2. La originalan tekston de ĝi,
3. La laŭvortan (ne poemforman) tradukon de la originalteksto aŭ minimume la enhavon.

Rekompence mi estas preta sendi la aŭstrian ŝtathimnon. Viajn sendojn bonvolu direkti al: Prof. R. K. Frühmann, Wien XVI., Ottakringerstr. 35/15, Aŭstrio.

Usonaj laboristoj sendis streptomicinon al Aŭstrio

La 19. 5. 1948 la „Arbeiter-Zeitung" (Laborista gazeto), Vieno, raportis pri dudek infanoj manlsaniĝintaj je tuberkuloza cerba haŭtinflamo, por kiuj la Viena infan-kliniko ne povis havigi al si la necesan kvanton da streptomicino urĝe bezonata por la traktado de la mortiga malsano.

Kiam la ambaŭ usonaj sindikataj delegitoj Irving Brown kaj Mikaele Ross, tiutempe ĉeestantaj la kongreson de la Aŭstria Sindikata Ligo, sciiĝis pri la malesperiga situacio de la malsaniĝintaj infanoj, ili tuj telegrafis Nov-Jorkon kaj petis siajn sindikatojn urĝe sendi streptomicinon.

Kaj vere la 11. 6. 1948 alvenis en la centra sekretariejo de la Aŭstria Sindikata Ligo en la manojn de la sindikata prezidanto Johann Böhm sendaĵo de 300 gramoj da streptomicino. Ĉi tiu vivon savanta, sed karega kuracrimedo estis donacata de la granda sindikato de l' virinkonfekciaj laboristoj en Nov-Jorko.

Ni ĝojas pri ĉi tiu sendaĵo ne nur pro tio, ĉar pere de ĝi saviĝis la vivo de aŭstriaj infanoj, sed ankaŭ tial, ĉar per tiu helpema agado montriĝis la efikanta solidareco de la laboristaro transe de ĉiuj maroj kaj kontinentoj. (Laŭ „Arbeiter-Zeitung".)

Universala Ligo — aŭstria reprezentanto

S-ro Hans Steiner, Kirchbichl, estas la reprezentanto de la Universala Ligo (UL) por Aŭstrio. La centra oficejo de UL estas en Den Haag, Riouwstraat 172, Nederlando. La tre interesa kaj riĉe ilustrita organo de UL „La Praktiko" kostas pojare nur 24,— aŭstr. ŝil. Membroj ricevas ĉiujare la Almanakon. Informojn donas kontraŭ reafranko la reprezentanto. Adreso: Hans Steiner, Kirchbichl, Tirol, Aŭstrio.

„Esperantujo" estiĝis apud la Danubo

La 13. 6. 1948 migradis karavano da Vienaj geesperantistoj al la ekskursa celo „Lobaŭ" por tie pasigi liberan tagon en freŝa aero sub radianta suno. Trans la Danubo jam estis vigla vivo. Multaj tendoj estis distribuataj inter la arbustaro kaj flagoj de diversaj societoj gaje flirtis en la vento. Verdaj estis la herbejoj, verdaj la arbustaro kaj verda la flago de ni geesperantistoj. Do neniu loko povus esti pli taŭga por la verdstelanoj kaj tial per trafaj vortoj de kelkaj kamaradoj ĉi tiu loko en Lobaŭ estis inaŭgurata „Esperantujo". La gaja solenaĵo estis beligata per kelkaj kantoj, kaj ĉiuj partoprenantoj ĝojis estis inter gajaj gekamaradoj. Poste multaj refreŝigis siajn korpojn en la akvo de la preterfluanta Danubo.

Gajan humoron vekis la piedpilkludado de la Esperantistoj kontraŭ la „Naturamikoj" kiu finiĝis rezulte 1 je 2 por la „Naturamikoj". Per kantado, ludoj kaj E-babiladoj la tago tro rapide pasis kaj oni bedaŭris, ke la vespero devigis nin hejmeniri. Sed disirante ĉiuj salutis: „Je baldaŭa revido en „Esperantujo" en la verda Lobaŭ.

Bedaŭrinde la ĉijara malbona vetero ne permesis plene eluzi ĉi tiun refreŝiglokon je multaj liberaj dimanĉoj, sed ni esperas, ke venontjare ni denove renkontiĝos en nia „Esperantujo" kaj alvokas la gesamideanojn aliloke, ke ankaŭ ili eluzu similajn eblecojn por praktiki Esperanton kaj samtempe ĝui la liberan naturon.

M. Finkenzeller.

Aŭstria reprezentanto de Esperanto Film-Grupo

Laŭ la prospekto F 2/1948 eldonita de la E-Filmgrupo en Bergen op Zoom (Antwerpsestraat 45, Nederlando), s-ro Stefan Szabo, Steyr, Werndlgasse 12., O.-Ö., transprenis ĝian reprezentadon por Aŭstrio.

La E. F. G. ĝis nun eldonis serion da 15 filmstrioj kun E-tekstlibretoj, alia serio estas en preparo. E-grupoj, kiuj disponas pri moderna projekcia aparato (tiuj por vitraj diapozitivoj ne taŭgas) aŭ povas prunti tian, povas aĉeti la filmstriojn kaj profite uzi ilin por instruaj lumbildvesperoj kaj tiamaniere levi la kulturan nivelon de la grupo.

Laŭ la prezskalo de 1. 7. 1948 unu filmstrio kun E-tekstlibreto kostas inter ŝil. 17,35—32,—. Pri pli detala informo turnu vin kontraŭ reafranko al la aŭstria reprezentanto.

Nekrologo

Mortis la 14. 5. 1948 s-ano Josef P e i s s l, ano de la E-grupo en Knittelfeld. Post la rekonstruo de la grupo en 1945 li aktive kunlaboris kiel kasisto kaj kursgvidanto. Ĉe la tombo dankis lin d-ro Halbedl pro lia oferema agado en la E-movado. Florkrona rubando kun E-lingva adiaŭo ornamis lian ĉerkon. La E-grupo konservas al li daŭran memoron.

„Aŭstria Esperantisto" — estas la oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien kaj de AGADO „Esperanto deviga fako en la lernejoj en tutmondo" kies n-ro 1 novaperis en Majo 1948 post interrompo de 1938. Eldonanto kaj redaktoro estas kortega konsilanto Hugo Steiner.

La organo estas multobligita kaj skribita german- kaj Esperantlingve. Gia enhavo ne alportas ion novan, sed ĝenerale ripetas jam konatajn faktojn, kiujn oni povis legi jam pli frue en la en- kaj eksterlanda Esperanto-gazetaro kaj oni vere povas dubi, ĉu ĝuste la eldono de „AE" estas l a t a ŭ g a rimedo por forigi la ĉie konatajn malfacilaĵojn rilate la oficialan enkondukon de Esperanto kiel d e v i g a n fakon en la lernejojn ĉiulande. Precipe la nuna tempo kun sia internacia politika disŝiriteco ne estas konvena por tia obstina propagando, ĉar propagando por certa afero je n e k o n v e n a tempo ofte pli domaĝas ol utilas.

Krome tia internacia varbado n e estas afero de iu nacia Esperanto-instituto aŭ organizo, sed devus esti oficiale farata de la Esperantista mondorganizo, do de UEA. La taskoj de Internacia E-Muzeo miaopinie estas tute aliaj ol okupiĝi internaciskale pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj la nomita „AGADO" havanta sian sidejon en la E-Muzeo laŭŝajne nur estas rondeto, ĉar en AE mankas la indiko pri la personoj formantaj la estraron de la „AGADO".

Kiel aŭstria Esperantisto, konanta la enlandajn cirkonstancojn kaj la pli fruan agadon de la eldoninto de AE, oni havas la impreson, ke s-ro kort. kons. Steiner per sia (laŭ la enhavo superflua) organo krome volas kvazaŭ konkurenci al la Aŭstria Esperantista Federacio. Sed AEF n e altrudas al la aŭtoritatoj la nuntempe vanan postulon pri d e v i g a enkonduko de Esperanto en la lernejojn, sed prudente atendas ĝis la cirkonstancoj naciaj kaj internaciaj por tio estas maturaj, ĉar serioza organizo ne bezonas personan reklamon.

A. Berdan.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

La fakkunsido de ALE dum la AEF-kongreso en Linz

Plej vigla, ege interesa kaj plej granda inter la fakkunsidoj de la kongreso estis certe la konferenco de nia frakcio. Fiksinte por ĝi du horojn de la vendreda antaŭtagmezo, oni pro la graveco de la traktaĵoj devis daŭrigi ĝin eĉ ĝis la malfrua posttagmezo. Tio montris la grandan intereson de ĉiuj gek-doj pri la prosperigo de nia afero.

Malfermis la kunsidon nia estimata k-do Ludwig Sager, prez. de ALE. Li unue nekrologis pri kvar k-doj, meritplenaj batalintoj pri la laborist-esperantista afero, pri kies morto ni estis informitaj nur nun.

La k-doj estas

Laurenz (Leo) Groll, Vieno, kiu en kadro de neleĝa grupo eldonis dum la aŭstrifaŝisma tempo poreksterlandan informservon en Esperanto (PEK). Li pro tiu agado estis dum 8 monatoj en la Suŝniga karcero. Li mortis en Sept. 1944 pro edemo en Besarabia milit-kaptitejo.

Franz Jaritsch, Ischl, kiu aranĝis en 1935 la neleĝan pentekostan lab. E.-konferencon en Ischl. Li mortis kiel antifaŝisto en koncentrejo Dachau.

Josef Pleschberger, Vieno, kiu batalis en Hispanio, mortis kiel antifaŝisto en Dachau.

Karl Richter, Vieno, kiu laboris en la ŝuŝniga tempo kun la antifaŝisma PEK-grupo en Vieno. Li mortis kiel viktimo de la hitlera milito.

La laborista Esperantistaro memorados ilin kiel konsciajn kaj modelajn batalintojn por la laborista Esperantismo.

Poste k-do Sager laŭtlegis la salutojn de la Labor-Esperantista Federacio (k-dino Robineau) kaj Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio (k-do Adamson), kiujn la gek-doj danke aklamis.

Petite de k-do Sager, nia estimata honorprezidanto, eksministro k-do d-ro Frenzel alparolis la konferencon per klardirekta parolado en Esperanto:

„. . . Multe da grandaj kaj malgrandaj nacioj hodiaŭ estas reprezentataj sur la scenejo de la mondo per homoj, kiuj ne reprezentas la popolon, ĉar la servo diplomatia estis kaj estas ankaŭ hodiaŭ la monopolo de certa rondo, privilegiita per la nasko.

Mi estas konvinkita, ke la socialismo estas la venonta formo de la socio kaj la reprezentantoj diplomataj devas veni el la popolo.

Por la anoj de la laborista klaso estas forŝlosata la servo diplomatia, ĉar niaj gepatroj ne povis pagi la elspezojn por la universitato kaj por longjara studado lingva.

Nun mi volas elmontri, ke Esperanto estos la lingvo diplomatia de la laboristaro. Ekzemple al reprezentanto laborista oni ne estus povinta diri tion, kion oni diris en Belgrad al la grafo Orsini-Rosenberg. Mi estas konvinkita, ke nek per aristokratio, nek kapitalismo la mondopaco estos atingata; por tiu tasko sole la laboristaro estas elektita. Nia venonta diplomatio ne povos ekzisti sen mondhelplingvo; sed ni Esperantistaj laboristoj estas la preparantoj de la vojo.

La aŭstria Esperantistaro povas rerigardi al grandaj sukcesoj. Tion mi derivas de la unueco inter la Esperantistaro kaj mi estas konvinkita, ke — se la nuna harmonio restados — ni atingos multajn kaj grandajn sukcesojn.

Por ni Esperanto ne devas esti la bazo, sur kiu diversaj opinioj politikaj interbatalas; ni aspiras la celon de lingva komprenado inter la popoloj; se ni atingos tiun celon, ni plenumos nian grandan kontribuon al la mondopaco.

Oni povus opinii, ke la politikaj partioj de la laboristaro metus sur la programon la enkondukon de Esperanto — bedaŭrinde ne okazas tio. Jen por ni laboristaj Esperantistoj ekzistas tasko: gajni nian politikan partion por ĉi tiu ideo!

Mi uzas la okazon por esprimi al la aŭstria laborista Esperantistaro mian koran dankon pri mia elekto kiel honoran prezidanton; en Vieno mi ĝis nun ne havis la okazon por tio kaj mi volas diri tion hodiaŭ, ĉi tie. Al la kongreso mem, speciale al la fakkunsido de la Esperantista laboristaro mi deziras plej bonan sukceson.

Amikecon!"

Post tiu ĉi atentinda parolado de nia honorprezidanto k-do Sager referis pri la laboroj faritaj de la frakcio.

La raporto de k-do Sager

La membrostato, kvankam kreskinta, ankoraŭ estas nekontentige malgranda. Gi pliiĝis de 84 je 21 al 105 frakcianoj, inter kiuj estas 55 socialistoj, 30 komunistoj kaj 20 senpartiuloj. Vieno estas plej aktiva. El la provinco nur estas 20 membroj! La provincanoj ne estas sufiĉe viglaj. Malgraŭ decido en Kufstein kaj ripetaj alvokoj en niaj organoj sin ne anoncis grupaj reprezentantoj, kio kaŭzis, ke la ALE-movado estis ĝis nun limigita nur al Vieno.

IES: Pro la nesufiĉa kunlaboremo kaj la financaj malfaciloj, rezultantaj el tio, IES, aperinta en Januaro presite, devis reaperi hektografite.

Interligilo, la informa bulteno priorganiza por la ALE-anoj, aperis regule.

Laboristaj paĝoj en AER: Tio bone funkciis; denove k-do Sager riproĉe plendis pri la minimuma eho al la instigoj kaj alvokoj de la komitato. Li petis pri konstanta kunlaboro kaj alsendo de manuskriptoj al li.

Eldona agado: Per la sindona kaj iniciata laborado speciale de nia konata k-do Haiderer ebliĝis la eldono de unu broŝureto: „Ĉu militoj estas eviteblaj?" de k-do Hugo Kraus. kies unua eldonkvanto baldaŭ estos elĉerpita, kaj de „Proleta kantareto" n-roj 1 kaj 2.

Eldono de flugfolio por la Internacia Junular-kunveno en Ebensee.

Biblioteko: Per donacoj ni kolektis 76 librojn, ĉefe laboristtendencajn.

Kunvenoj: okazas en Vieno regule, ĉiun unuan sabaton en la monato. Aparta laborprogramo, disprunto de libroj kaj eksterlandaj gazetoj, liveritaj interŝanĝe per IES; kantado. Oni imitu tion en la liglandoj!

Manifestacioj: okazis dum la festo de la Unua de Majo (partopreno al la socialista kaj komunista kolonoj).

Ekskursoj: Komuna ekskurso la 2-an de Majo (55 partoprenintoj, kun standardoj kaj muziko). Komuna soleno en libera naturo kun parolado de k-do Haiderer; kantado, societaj ludoj. Alvoko al la provincaj gek-doj: ili faru la samon!

E-kursoj: Aperas kurso en la semajna gazeto „Die Frau", gvidata de k-do d-ro Grimme. Kursoj ĉe „Infanamikoj" (k-do Bouché); Shell-uzinoj (k-do Ludwig Kraus).

Atingo de E-ema rezolucio dum la kongreso de Aŭstria Sindikata Ligo ÖGB (iniciatis k-doj Zink kaj Hawla).

La laborplano de la komitato por 1948/49.

1. Plivastigo de la laborista korespondado inter neesperantistoj en la kadro de IES.

2. Instalo de novaj kursoj ĉe Schichtwerke, Danubia Öl, Shell, Infanamikoj kaj aliaj fabrikoj.

3. Aranĝo de amuzvespero dum aŭtuno por prosperigi nian kason.

4. Entrepreno de ĉio necesa por penetri inter la junulojn, interrilatigi ilin kun eksterlando kaj organizado de partopreno de junaj E-istoj al la internaciaj junularaj tendaroj por efike propagandi la praktikecon de E. por ili.

Por fari tiun gravegan laboron, necesas antaŭ ĉio plivastigi kaj plidensigi la reton de lab. Esp-istoj en Aŭstrio, t. e. labori ĉiuloke por nia Aŭstria Laborista Esperantistaro! Anoncu vin do kiel delegitojn kaj kunlaborantojn el ĉiuj anguloj de Aŭstrio!

Fininte sian referaĵon, kiu estis akceptata de la k-daro, amiko Sager proponis la akcepton de dankletero al k-do Franz Haiderer, kiu en nesupereble modela kaj abnegacia maniero iniciatis kaj akcelis la aferojn de ALE, kompostante la eldonaĵojn, verkante artikolojn, farante la plimulton de ĉiuj korespondaj kaj ekspedaj laboroj mem. Post nokta deĵoro, anstataŭ dormi li iris en la E-Centron por manipuli niajn aferojn. (Propono unuanime akceptita.)

La diskutoj

Parolis, multe aklamate, pri siaj sagacaj polemikoj kontraŭ la neesperantema kulturreferanto de „Vertrauensmann" de SPÖ la k-doj Eder (Graz) kaj Fötinger (Salzburg).

Pri la irado de novaj vojoj por la populariĝo de nia movado parolis k-do d-ro Hovorka, sugestante la intensigon de interfabrika korespondado de neesperantistaj laboristoj kun eksterlando per Esperanto (ideo, cetere enhavata en la taskaro de IES).

Pri la kaŭzo de la ĝenerala kulturstagno en la raporta periodo parolis k-do Hugo Kraus, menciante la zorgojn de la homoj kaj la eksterajn influojn de la politika situacio, kiuj plimalpli indiferentigis ilin ne nur al la ideo de E., sed al ĉiuj aferoj kulturaj. Tiu fenomeno ne senkuraĝigu nin, sed igu nin eĉ pli persistaj por transvivigi nian aferon trans tiun krizon, por montri nin indaj daŭrigantoj de Zamenhof. Praktika propono por nia agado: pliintensigi la agadon de niaj ambaŭ sekcioj, por penetri en la partiojn. Laŭ komisio de k-do Haiderer li konsiderigas ankaŭ la durubrikan redaktadon de IES kun unu parto socialista kaj unu parto komunista, por kontentigi la pretendojn de ĉiuj k-doj.

Pri la temo de la unueca agadmaniero de nia frakcio parolis kun granda vervo la k-doj Glüxmann, Hovorka, Kraus, Sager, Slezak kaj Vokal. En la debato oni akcentis, ke laŭ la ideoj, esprimitaj dum la fonda kunsido de ALE en Kufstein ALE estu kaj restu la superpartia laborista frakcio de AEF, kiu laboru por la celo de agado kun la respektivaj partioj je du sekcioj: socialista, komunista; la superpartia frakcio havu la signojn de laborist-tendenca, antifaŝista laborado kaj la sincera aktiva kunlaborado sub la moto: Per Esperanto por socialismo. Laŭsperte oni harmonie laboras. Ni havas unu saman celon: venkigi Esperanton. Oni esprimis, ke la socialistaj gek-doj pliaktivigu sian sekcion.

La elektoj

Post tiu tre vigla diskuto oni rezulte reelektis unuanime la malnovan estraron, kiu konsistas el la gek-doj Sager kaj Vokal kiel unua kaj dua prezidantoj, k-dino Krautschneider kiel kasistino (anstataŭ k-do Wallner, kiu estas deĵore malhelpata) kaj la gek-doj Zöchling, Zottel, Dalamasl, Haiderer, Hayni, Hugo Kraus, Gustav Loibel kaj Melker. Alelektataj estis la k-doj Fötinger (Salzburg) kaj Slezak (Vieno).

Tiu elekto montris, ke ĉiuj gek-doj aprobis la ĝisnunan, bonspertan kunlaboron sur bazo de la Kufstein-aj ideoj, konforme ankaŭ al la direktivaj vortoj de nia honorprezidanto, k-do d-ro Frenzel. Por trovi pli taŭgajn vojojn por penetri en la partiojn oni laŭ propono de k-do Slezak unuanime komisiis la estraron, elekti inter si specialan komitaton.

Eventualaĵoj

Je tiu punkto ni kolektis por la vidvino de k-do Groll, kiu estas malsana kaj en mizera situacio la sumon de ŝil. 80,50.

Poste k-do Sager fermis la kunsidon, instigante ĉiujn gek-dojn al pliintensigo de iliaj laboroj por la taskoj de la laborista Esperantismo.

Komuna kantado de „Fratoj al sun' . . ." finis la laborrikan konferencon de ALE.

Raportis Hugo Kraus kaj Slezak.

Revido kun „Aŭstria Esperantisto"

Kun surprizo ni laboristaj Esperantistoj konstatis la reaperon de la or-

gano de l' s-ro kortega konsilanto Hugo Steiner. Tio memorigas nin pri la sama eldoninto, kiu en la jaro 1934, kiam la aŭstro-faŝistoj detruis krom la aŭstrian laboristan movadon ankaŭ la laboristan E-movadon, servute flatis per „Aŭstria Esperantisto" al la tiamaj „gvidistoj".

En niaj manoj cirkuladas la fotokopioj de „Aŭstria Esperantisto", oficiala organo de la Internacia Esperanto-Muzeo kaj de „Aŭstria E-Asocio" n-ro 2/1934, en kiu oni fruntpaĝe, grandlitere povis legi: „Al la Savintoj de Aŭstrio!". El la servuta frazaro ni volas citi nur unu frazon: „Ni dankas Vin el tuta koro kaj estas certaj, ke vi nun gvidas nian hejmlandon Aŭstrio al pli bona estonteco!"

Subskribita estis tiu flataĵo de s-ro Steiner. Fluis laborista sango kaj mortfalis laboristoj per la pafiloj kaj kanonoj de la Starhemberg kaj Fey, detruiĝis la laborista E-movado aŭstria, sed por sinjoro kort. kons. Steiner tio estis bonvena okazo por „danki el sia tuta koro". Tiam ni skribis sur la randon de „AE": „Neniam forgesi!"

Ekzistas homoj, kiuj komprenas ĝustatempe malaperi de la scenejo de sia bona aŭ malbona agado, sed ne ĉiuj estas tiel prudentaj pro personaj ambicioj, kiam proponas sin al ili tia ebleco. La laborista Esperantistaro ĝis nun silentis pri la tiama maldemokrata konduto de la tiama prezidanto de AEA kaj direktoro de IEMW, kort. kons. Hugo Steiner. Sed la reapero de „AE" denove atentigas nin pri la ekzisto de li kaj ni nun akre observas liajn nunajn farojn. Ni ankaŭ ne preterlasos la okazon por atentigi la socialistajn ministrojn kaj aliajn aŭtoritatojn pri la politika pasinteco de la eldonanto de „AE". Ni nenion forgesis!

L. S.

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

Raporto pri la Fakkunsido de AKLE en Linz/13an de Aŭgusto 1948

S-ano Mudrak, Wien, malfermis, salutis la ges-anojn (40 el preskaŭ ĉiuj aŭstriaj liglandoj), precipe sekc. kons. d-ron. M. Führing kaj la pastrajn moŝtojn em. paroh. J. Gleixner, Rosenau (Malsŭpra Aŭstrujo), D-ron. Peter Hohenwarter, Klagenfurt, Katedr. vik. J. Kaps, Salzburg, P. Pius Lenz, O. Cap., Klagenfurt (kiu venis malpli frue), P. Raynald Schmalbaug, O. Cist., Abatejo Zwettl (Malsŭpra Aŭstrujo) kaj P. Anton Schmitt, S. J., Innsbruck, kaj memoris je la mortintaj s-anoj de pasinta jaro, speciale P. Wolfgang Nedwid kaj s-ano Leopold Chiba, anbaŭ Wien.

Kat. vik. Kaps raportis pri la agado en la ĉefdiocezo Salzburg: La unuopaj katol. ges-anoj en la diversaj grupoj de AEF havas interligon precipe per „St. Rupertusbote" (la oficiala eklezia gazeto de la ĉefdiocezo) kies Esperanto-favoro estonte ankoraŭ pliiĝu. Dr. Hohenwarter menciis pri siaj klopodoj, enkonduki Esperanton en la seminarion de pastro-studantoj; li konsideras Esperanton ankaŭ signifa laŭ vidpunkto de formigo de karaktero. D-ro. Halbedl, Knittelfeld, energie postulis ankoraŭ pli viglan interesan kaj seriozan okupon pri Esperanto inter la kat. pastraro ankaŭ en rilato al liturgio kaj misia agado kaj proponis starigon resp. plivastigon de katol. gazetara servo por kaj per Esperanto. P. Raynald, Zwettl, proponis skribi dank-salut-kaj sindon-leterojn al la

aŭstria episkoparo (jam plenumita). S-ano Cech salutis nome de AEF.

Parolis ankoraŭ s-anoj Dir. H. Sappl, Salzburg, L. Huber (Wien) por la katol. metiista unuiĝo (Kath. Gesellenverein/Kolpinghaus), R. M. Frey, sciigante ĝojigan intereson por Esperanto ĉe Lernejaj Fratoj (Schulbrüder) en Goisern (Supra Aŭstrujo). Sekvis ankaŭ raporto pri la fakkunsido kaj Di-servo de la katol. ges-anoj en Malmö kaj pri la stato de „Espero Katolika", nia oficiala internacia organo. Unusente oni fine esprimis fidelan anecon al AEF, superpartia, kaj pritraktis estontan laboron en ties kadro. M.

La fakkunsido decidis jenan rezolucion:

Rezolucio

La **kunveno de la katolikaj esperantistoj** en gastejo „Ora Suno" dum la Aŭstria Esperanto-Kongreso **en Linz** la 13an de Aŭgusto 1948 ĝoje konstatis, ke partoprenis jam pli multaj pastroj-esperantistoj (estis 6) ol antaŭjare en Kufstein. Gi aplaŭdis tiun esperigan fakton kaj esprimis, ke baldaŭ rezultu el ĝi ĝenerala favorigo de Esperanto flanke de la ekleziaj aŭtoritatoj. Ĉi tiujn la kunveno ree atentigis pri Esperanto kiel nerezignebla kompletigilo de la kredanara kunvivado en la tuta mondo kaj prezentis la konsideron de kiel ebla nova tasko de Esperanto, ke ĝi estos uzata ankaŭ en la liturgio tiom, kiom la preĝanta komunumo jam nun partoprenas la liturgion kunage.

La sama kunveno ankaŭ dankis al la metropolitoj de la rom-katolika eklezio en Aŭstrujo, lia kardinala moŝto d-ro. Theodor Innitzer kaj ĉefepiskopo d-ro. Andreas Rohracher pro la valora subteno de la Esperanto-movado kaj petis ilian daŭran favoron por tiu ĉi eminenta rimedo de paco interpopola.

Fine la kunveno ree esprimis sian fidelan anecon al AEF, fine atendante, ke tiu ĉi restos same supertendenca kiel ĝis nun. H.

La oficiala **Di-servo** okazis dimanĉe la 15an de Aŭgusto (Festo de la Akcepto de Mario en ĉielon) en la Ignatius-preĝejo (la nalnova katedralo), kiu, malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj rilate al preparo, fariĝis efektive impona. La, ni vere povas diri, festa prediko de Pastro katedrala vikaro Joh. Kaps estis altsignifa travivaĵo por ĉiuj aŭskultantoj.

Dum posttagmeza ekskurso al Pöstlingsberg kolektiĝis areto de katol. ges-anoj en la tiea pilgrima-preĝejo, kie Pastro Raynald Schmalbaug de Abatejo Zwettl faris sanktan benon kaj predikis en Esperanto kaj koncize ankaŭ germanlingve por la multaj neesperantistaj ĉeestantoj (i. a. akcentante la porpacan mision de Esperanto).

W. M.

Dum la **XXXIIIa Universala Kongreso en Malmö** okazis **katolika Di-servo**; P. Modesto Carolfi, O. F. M., veninta kun la itala karavano el Romo, predikis, prof. Beckers, Belgujo, celebris la sanktan meson. La kompare ne tre granda Diaspora-preĝejo de Malmö preskaŭ ne povis enteni ĉiujn venintajn ges-anojn el 12 landoj.

En la **Fakkunsido,** kiun ĉeestis ges-anoj el 8 landoj, raportis i. a. prof. Beckers pri „Espero Katolika", nia oficiala organo. Gi havas pli multajn abonantojn nun ol antaŭ la milito, eĉ pli multajn ol iam ajn, sed la plua apero momente ne estas ebla, ĉar la abonpagoj el multaj landoj ne povas esti transsendataj al la administrejo en Nederlando. Okazas plua klopodo por trovi ian solvon. W. M.

Nekrologo

Profunde ni funebras pri la morto de nia longjara senlaca trankvile modeste laboranta prezidanto kaj honorprezidanto Leopold Chiba. Ankoraŭ la 2an de Julio t. j. ni povis gratuli al li, kvankam jam sufiĉe malsana, okaze de lia 75a naskiĝ-festo. La 26an de Julio, je la festo de Sta. Anna, li forlasis tiun mondon. R. I. P.

La kara mortinto havis grandajn meritojn precipe por la katolika Esperanto-movado, i. a. por la Internacia Katolika Esperanto-Kongreso en Wien, 1924, la aranĝoj dum „Katholikentag"

1933 kaj dum la Universala Kongreso 1936. Ankaŭ la eldono de la „Kantaro Katolika“ estis lia verko, por kiu li oferis multan tempon kaj forton.

Ni daŭre memoros inde nian prezidanton kaj preĝos por li.

Ĉe la entombigo vendrede la 30an de Julio t. j. parolis nome de AKLE s-ano Siedl profundsence, s-ano Cech nome de AEF kaj kort. kons. Steiner por IEM.

AKLE sincere dankas al ili ĉiuj gesanoj venintaj por lasta surtera adiaŭo de nia meritplena prezidanto.

Okazos speciala s-meso je lia memoro, pri kiu ni ankoraŭ raportos.

W. M.

El la katolika Esperantomovado germana

Dum germana E-kongreso pentekoste 1948 en München ankaŭ okazis apartaj aranĝoj por la katolikaj Esperantistoj. Dimanĉe je la 8-a h. estis katolika Diservo en la malnova preĝejo de Sendling kun prediko, preĝado kaj kantado en Esperanto, partoprenita de ĉ. 650 kreduloj. Estis impresplena travivaĵo: centoj da voĉoj unuiĝintaj en komuna preĝo en Esperanto! Sacerdoto kaplano Thalmaier prelegis esperantlingve la evangelion de la pentekosta festtago. Poste li faris predikon en Esperanto atente auskultitan de la kredularo. La predikisto inter alie diris:

„Se ni komparas la eklezion de niaj tagoj kun la ĉirkaŭ tricent-kvindek milionoj da kredantoj kun la eklezio de la pentekosta festo el la jaro 33 kun nur trimil kredantoj, ni devas aŭtomate pensi je la vortoj de Jesuo Kristo: La regno de Dio estas simila al sinapa semeto, kiun viro prenis kaj ĵetis en sian ĝardenon; kaj ĝi kreskis kaj fariĝis arbo kaj la birdoj de la ĉielo loĝis en ĝiaj brancoj. Malgraŭ tiu ĉi granda ekstera transformado, la eklezio estas ĉiam la sama kiel je la unua pentekostfesto. La Sankta Spirito, la konsolanto kiun la Patro en la nomo de Jesuo Kristo la unuan pentekosten estis sendinta el la ĉielo sur la teron, estas la suno, kiu senĉese brilas super la eklezio, la regno de Dio sur la tero ĝis la reveno de Jesuo Kristo ĉe la fino de la mondo.“

Dum la sankta meso senteme kantis la juna baritono s-ano K. A. Kohler en Esperanto: „La honoron de Dio“ de Beethoven. Diversaj kredantoj akceptis la sanktan komunionon.

La E-kongreson salutis kaplano Thalmaier nome de la katolika E-movado germana dirante: „Ne nur la pli ol 650 partoprenintoj de la hodiaŭa katolika Di-servo en Esperanto, sed ĉiuj kongrespartoprenantoj kunprenu la impreson, ke ankaŭ en nia tempo, kiel jam en la pasinta tempo oni faras de la katolika flanko multajn klopodojn disvastigi Esperanton. La specialaj celoj de la katolika E-movado estas, mallonge dirite, jenaj: „La persona lingva interkompreniĝo en vorto kaj skribo de la anoj de la sama kredo, kiu estas disvastigata sur la tuta mondo. Memkompreneble ankaŭ ni katolikaj E-istoj vidas en Esperanto idealan popolkomprenigilon.“

Pli poste raportis kaplano Thalmaier antaŭ la kongreso pri la laboro de la kat. sekcio de GEA: Pasintjare estis dissendataj 8000 da flugfolioj teme: „Esperanto kaj ni katolikoj.“ En katolikaj revuoj aperis artikoloj pri Esperanto kaj ankaŭ radio München kelkfoje sendis kat. E-sciigojn. La kat. E-movado en Germanujo kunlaboras kun GEA, ĉar ĝi estas konvinkata, ke estas tre bone kaj utile, se ĉiuj germanaj E-istoj unuiĝas en unu forta E-organizo La referanto fine diris, la nekatolikaj E-istoj pripensu, ke la kat. klopodoj pri Esperanto estas ankaŭ por la utilo kaj progreso de la ĝenerala E-movado en Germanujo kaj en la mondo.

Katolika fakkunveno okazis en la „Katholisches Gesellenhaus St. Anna“. Partoprenis ĉ. 160 personoj. Raportis kaplano Thalmaier pri la kat. E-literaturo kaj organizaj aferoj. Kiel en aliaj landoj ankaŭ en Germanujo estas la komuna unuiĝo por ĉiuj E-istoj la Germana E-Asocio sur neŭtrala fundamento. En la kadro de tiu ĉi asocio la diversaj tendencoj havas la eblecon formi unuiĝojn, kiuj per Esperanto volas atingi specialajn celojn. Tial

formiĝis ankaŭ kat. sekcio, kiu reprezentas la kat. interesojn en GEA kaj kiu havas la ĉefcelon disvastigi Esperanton inter la germana katolikaro je utilo kaj bono de nia eklezio. Kaplano Thalmaier turnis sin ankaŭ kontraŭ la t. n. „Germana Katolika Unuiĝo Esperantista", fondita antaŭ kelkaj monatoj de s-ro Mielert en Bamberg, kiu ne volas kunlabori kun GEA. En la diskuto ĉiuj estis (1 voĉo esceptate) kontraŭ la nova organizo.

Al kardinalo ĉefepiskopo d-ro Michael v. Faulhaber estis sendata ovacia letero. La kunveno estis fermata per preĝo al la Sankta Spirito.

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

(Agadsferoj: lingvo, literaturo, pedagogio, sciencoj.)

Jar-raporto 1947—1948 farita en la Aŭstria Esperanto-Kongreso en Linz la 13an de Aŭgusto 1948.

La Aŭstria Esperanto-Instituto kiel libera laborkomunumo de la Aŭstria Esperantista Federacio kunvenadis kaj laboris ankaŭ en la pasinta jaro laŭ la donitaj eblecoj. Sed ĝia agado grave suferis pro la manko de veraj fakuloj, kiuj povus apliki aŭ almenaŭ prepari la aplikon de Esperanto en sciencaj rondoj.

Tamen el la laboroj de la Instituto estas menciindaj jenaj:

1. Lingvaj laboroj:

a) La ortografia reformprojekto de pastro Kubacki en Milwaukee estis malaprobita interkonsente kun la direkcio de Aŭstria ŝtata ekzamenkomisiono. Kopio de nia letero trovis plenan konsenton flanke de la prezidanto de la Esperanto-Akademio.

b) En la kunsidoj de la Instituto oni traktis diversajn lingvajn demandojn kiuj grandparte estas aperigitaj en AER.

c) En projekto de privata eldonisto, aperigi „internacian vortarkodon" nia sekretario kunlaboris per aldono de Esperanto-vortaro kaj artikoleto informanta pri Esperanto. (Gi ĵus aperis kaj estas havebla en la librovendejo de „Tramondo".)

d) Okazis priparoloj por aranĝi en aŭtuno filologian paroladon pri Esperanto antaŭ la filologia societo de la universitato de Vieno.

2. Kunlaborado en sciencaj kampoj:

a) Prof. Sirk kaj Frühmann deklaris sin pretaj kunlabori en ellaboro de kemia fakvortaro, entreprenita de Curt Dellian-München.

b) La en la pasinta jaro kompilita „Aŭtoteknika vortaro", ĝis nun ne utiligita de la instiginto, estas nun publikigota flanke de la AEI.

3. Konkursoj:

En la longdaŭra konkurso pri la plej bona traduko de nia nova aŭstria himno fine la verko de sinjorino Christine Siedl estis elektita kaj konigita en AER kaj per Radio.

4. Kurso:

Preparkurson por kandidatoj de la instruista Esperanto-ekzameno gvidis prof. Sirk (pri historio de Esperanto) kaj s-ro Werner (pri pedagogia psikologio kaj metodiko de la lingva instruado). Kvankam la kurso estis senkotiza, bedaŭrinde partoprenis nur tri personoj.

5. Pedagogiaj aferoj:

a) La instituto povis kontakti kun la instruista fakgazeto „Freie Lehrerstimme" kaj kun la oficiala gazeto „Erziehung und Unterricht." En ambaŭ aperis favoraj artikoloj pri Esperanto.

b) Lau peto de gimnazia profesoro Nanay el Debrecen ni informis pri la principoj de la instruado en Aŭstrio. La informoj estis uzitaj en publika parolado antaŭ hungaraj instruistoj.

6. Vortaroj:

En la lasta jaro aperis la en la AEI prilaborita nova vortaro Esperanta-germana. La dua parto germana-Esperanta estas nun kompostata kaj parte jam korektita. Gi antaŭvideble aperos ankoraŭ en tiu ĉi jaro.

La Argentina Esperanto-Ligo sendis al AEI pakaĵon de vestaĵoj, kiuj estas disdonitaj inter la plej bezonantaj kunlaborantoj. La dankon ni ankaŭ publikigis en AER.

La sekretario: E. Werner — La direktoro: Dr. L. Grimme

Internacia ESPERANTO-MOVADO

La 33a Universala Mondkongreso de Esperanto

De la 31a de Julio ĝis la 7a de Aŭgusto okazis en la bela sveda urbo Malmö la Universala mondkongreso de Esperanto. El 33 landoj de ĉiuj mondpartoj aliĝis 1761 geesperantistoj al tiu internacia manifestacio de nia ideo.

La bone organizita kongreso donis al ĉiuj partoprenantoj ne nur tre agrablajn ĝuojn per diversaj aranĝoj kaj ekskursoj, ĝi rezultigis ankaŭ fruktedonan laboron.

Dum la solena malfermo je la 31a de Julio parolis multaj oficialaj reprezentantoj de diversaj landoj kaj delegitoj de landaj organizaĵoj. Grandan aplaŭdon ricevis la germana parolanto, kiu nun havis la okazon, saluti la kongreson kaj la internacian esperantistaron. En la nomo de la familio Zamenhof salutis s-ano Ludoviko Zamenhof. La sekvanta interkonatiĝ-vespero donis eblecon al ĉiuj trovi malnovajn kaj novajn amikojn.

Dimanĉe okazis du Diservoj kaj poste komuna fotografado. La organiza laboro komenciĝis lunde. Malfermiĝis la universitato, en kiu okazis dum la kongresa semajno multaj interesaj paroladoj. Ekskursoj kondukis la gekongreanojn en la ĉirkaŭaĵon de la urbo. Filmprezentadoj montris belajn regionojn de Svedujo. Estis prezentata ankaŭ la unuan fojon la esperantosonfilmo pri Danlando.

Krom multaj fakkunsidoj de diversaj internaciaj fakorganizaĵoj esperantistaj okazis tri laborkunsidoj ĝeneralaj. Dum la unua estiş pritraktata la organizaj raportoj kaj laboro. Gi montris, ke nia [illegible] progresas en multaj landoj. Montriĝis ankaŭ, ke estas necese, ke UEA akiru minimume 400 novajn membrojn, por eviti deficiton ĉijare. Bedaŭrinde por kelkaj landoj pro la monaj malfacilaĵoj ne estas ebleco, individue aliĝi al UEA. S-anoj el landoj, de kie estas pagebla la kotizo al Anglujo, adoptu s-anojn el tiuj landoj, el kiuj ne estas eble sendi la monon al Anglujo.

D-ro Lapenna donis dum la dua laborkunsido bonajn instigojn por la propagando. Li ankaŭ proponis, ke UEA organizu centran propagandon oficejon, por ke la tutmonda propagando estu unueca kaj malfortaj organizaĵoj ricevu subtenon.

La tria laborkunsido estis dediĉita al la temo „Someraj universitatoj kaj internaciaj lernejoj". Jam ekzistas en kelkaj landoj someraj lernejoj, inter aliaj en Danlando, Ĉehoslovakujo, Svedujo, Norvegujo ktp. Ĉiu landa organizaĵo klopodu starigi plej eble baldaŭ similajn aranĝaĵojn, aŭ universitatojn aŭ lernejojn aŭ somerajn restadejojn.

La urbo Malmö tre subtenis la kongreson. Dum la kongresa semajno ĉiu kongresano rajtis senpage veturi sur la tramo kaj aŭtobusoj. Jaŭde vespere la urbo regalis la gekongresanojn per teo kaj buterpano. Poste okazis la internacia balo, kiu montris tre varian bildon.

La inda 33a bonharmonie pasis kaj je la solena fermo de la kongreso la vortoj „Vivu la 34a! Gis revido en Bournemouth" certe venis el la profundo de la koroj.

Katzianka.

La unua Danubvala Esperanto-konferenco en Budapeŝto

De la 22a ĝis la 25a de Julio 1948 okazis en Budapeŝto la unua Danubvala Esperantokonferenco. El Aŭstrio partoprenis 27 gesamideanoj. Granda nombro da hungaraj esperantistoj sa-

lutis la alvenintojn per iliaj naciaj flagoj. Jam la unua impreso pravigis la Esperanto-broŝuron „Budapeŝto vivas denove!“ Vespere okazis en la klubejo de la „Laborist-unueco“ la interkonatiĝvespero.

Jaŭdon, la 22an de Julio, komenciĝis la unua laborkunsido en la delegacia ĉambrego de la parlamento. Unuanime oni esprimis, ke ne estas fondita nova organizo, sed kontakta komitato ekkomencis agadi por la oficialigo de Esperanto en la Danuba regiono. El la raporto de la ĉefsekretario Berceli Bela de la hungara Esperanto-Asocio ni aŭdis, ke ĝi estas same supertendenca kiel la Aŭstria Esperantista Federacio.

La oficiala delegito de Aŭstrio, d-ro Leopold Grimme, skizis en sia salutparolado la sukcesojn de la aŭstria Esperantomovado. Posttagmeze en la malnova urbdomo de Budapeŝto urbestro Josef Bognar bonvenigis la konferencon. Li parolis pri la ideo de internacia lingvo kaj pri la mezepoka latino, scipovita ne de la popolo, sed nur de la scienculoj. S-ro Imre Molnar, viceprezidanto de la hungara parlamento, salutis la konferencon. K-do Kapaŝ, delegito de la hungara partio de laboro, akcentis la grandan porpacan taskon de la Esperantomovado.

La sekvantan tagon la ĉefdelegitoj vizitis ŝtatajn eminentulojn. Ministroprezidanto Rakosi dum la oficiala akcepto deklaris, ke li amas Esperanton, li komprenas sen traduko la alparolojn de la delegitoj. S-ro Werens Peter de la agrarpartio diris al la delegitoj, ke lia partio akcelas Esperanton, kaj kundonis salutleteron al la Aŭstria federacia kanceliero. La konferencanoj vizitis en tri grupoj la industrian centron Csepel, ŝtatigitajn teksaĵ- kaj ferfabrikojn, kaj presentreprenon. Cie oni admiris la celconscian rekonstruadon.

La pedagogian fakkunsidon prezidis Julio Baghi, la famkonata hungara Esperantoverkisto kaj ĉemetoda instruisto. Post la kunsido estis aranĝata skriba Esperanto-ekzameno por hungaroj. La trafika fakkunsido rezultigis fondon de „Internacia Ligo de Esperantistaj Transportistoj“ kun sidejo en Budapeŝto. En la delegacia ĉambrego okazis samtempe la fremdultrafika kunsido. La plej interesa informo estis, ke la hungara fremdultrafik-oficejo eldonis en tiuj tagoj la dekmilan prospekton en Esperanto. Oficialaj delegitoj ĉeestis de la turisma sekcio de la ministerio por trafiko, krome la direktoro de la sanigbanejoj kaj la direktoro de la hungara fervoja direkcio. Unuanime estis akceptita rezolucio de la aŭstria delegito d-ro Grimme pri fremdultrafiko kaj Esperanto. Ankaŭ filatelista fakkunsido okazis. Grandan impreson faris la parolado de la blinda hungara samideano Ulmer, kiu raportis, ke multaj samsortanoj estis dum la milito forportitaj kaj pereigitaj; nuntempe la Esperanta blindula societo „Belhoro“ en Budapeŝto nombras 80 anojn. En la superaj klasoj de la lernejo por blinduloj Esperanto estas enkondukita kiel deviga fako.

Vespere okazis belega artvespero en la Széchenyi-banejo, kie s-ano Biro kun kvarteto prezentis internacian muzikon. Julio Baghi kaj Koloman Kalocsay deklamis el propraj verkoj.

La bulgara s-ano Dolaptsciev raportis dum la sekvanta laborkunsido, ke en Bulgarujo ekzistas Esperanto-kooperativo kun 6000 levoj da kapitalo. Ili havas propran Esperanto-eldonejon kaj presejon, kie estas eldonata la organo de la Danubvala Kontakt-Komitato „Internacia Kulturo“. Ili presis la libron „Septembro“, kiu skizas la heroismon de la Bulgaroj dum la okupacio. La bulgara poŝtdirekcio eldonis serion de Esperantopoŝtmarkoj okaze de la 60jara jubileo de Esperanto.

S-ano Ginz el Ĉehoslovakio raportis, ke Radio Prag I disponas pri propra Esperanto-stacio, nomita „Verda Stacio“. Okaze de la Sokolfesto oni sendis dum 70 minutoj en Esperanto la raportojn pri tiu festo.

S-ano d-ro Isak el Slovakio raportis pri la Slovaka Esperanto-Instituto kaj pri viglaj Esperantogrupoj en Trenĉin kaj Bratislava. Li disdonis broŝurojn de la Slovaka Turisma Servo en Esperanto.

En la debato pri la gazeto „Literatura Mondo“ la famkonata Esperantoverkisto Koloman Kalocsay faris interesan paroladon pri la evoluo de literaturo en Esperanto. Kelkaj delegitoj, inter ili d-ro Halbedl el Aŭstrio, petis la redakcian komitaton, eviti laŭeble neologismojn.

S-ano Balkany raportis pri UEA menciante, ke la membroj de UEA de la Danubvalaj asocioj estas sesono de la tuta membraro de UEA. Oni faris kelkajn proponojn pri demokratigo de UEA.

La jugoslavia delegacio raportis, ke la Esperantomovado en ĝia lando nombras nun 1200 membrojn. La plej modela Esperanto-societo estas tiu de Zagreb. Grandan sukceson oni atingis per kolektiva korespondado kaj grandan propagandan efikon havis la Esperantosemajno. La jugoslavia ministro Aleksitsch ordonis la enkondukon de Esperanto kiel nedeviga fako en la gimnazioj. La sindikato dissendis cirkuleron por rekomendo de Esperanto al UNO.

Kun granda admiro oni aŭdis la alparolon faritan de d-ro Ivo Lapenna en Radio-Parizo al la delegitoj de la Danubvala Esperantokonferenco. La Budapeŝta Radiostacio intervjuis la ĉefdelegitojn de la Danubvala Konferenco. Menciinda estas la parolado de Koŝa Stefan, la sindikatestro, pri Esperanto. La sindikato preparas rekomendon de Esperanto al UNO. Li diris: „Ju devas komenci.“ Julio Baghi proponis, ke UEA akceptu en la regularo la kondamnon de la faŝismo laŭ internacia juro kaj la Esperanto-mondorganizo estu gvidata de homaranisma vidpunkto.

Vespere la gekonferencanoj faris komunan ŝipveturadon sur la Danubo. La urbopartoj ĉe ambaŭ flankoj de la rivero estas ege detruitaj, sed ĉie oni rekonstruadas.

Dum la konferenco la poŝtaĵoj estis signitaj per speciala memorstampo. La hungara monfarejo donis kiel memoraĵon al la konferencanoj belan medalon kun la surskribo „Unua Danubvala Esperanto-Konferenco“ kaj desegnaĵo de la reĝa kastelo.

Dimanĉe tagmeze finiĝis la sukcesplena konferenco per la Esperantohimno. Ni rajtas esperi, ke la „Danubregiona Kontaktkomitato“ baldaŭ rezultigos daŭrajn progresojn en la aplikado de Esperanto inter la Danubregionaj popoloj. — E. V.

Belgaj E-Asocioj imitis la aŭstrian organizformon

Antaŭ kelkaj monatoj s-ano Fr. Charles, sekretario de la E-grupo „La Ankro“, Farciennes, Belgujo, sendis al ni kopion de Malfermita letero al la estraro de Reĝa Belga Ligo Esperantista, per kiu la opoziciaj grupoj proponas ŝanĝon en la ĝisnuna agado de la estraro kaj en la organiza formo de la ligo. El la detala kaj ampleksa letero ni pro spacomanko povas citi nur jenajn partojn:

„Nun, estimataj gesamideanoj, ni esprimas la deziron, ke Reĝa Belga Ligo Esperantista pli bone laboru por nia movado kaj ke estonte la kongresoj ne plu estu por vi nur okazo por agrable amuziĝi, por reciproke vin gratuli aŭ laŭdi, sed ke ili estu tiaj, kiaj ili devas esti, ke, same kiel en aliaj landoj ili estu grava okazo por serioze ekzameni kune la plej bonajn rimedojn por antaŭenpuŝi nian movadon, por starigi planon por la propagando ktp.

Ni deziras sciigi al vi ke de nun ni klopodos kaj se necese ni eĉ batalos por ke kiel eble plej baldaŭ la diversaj landaj belgaj organizoj unuiĝu en unu sola, sed kiom pli multe forta Belga Esperantista Federacio, kiu grupigu ĉiujn sincere sindonemajn geesperantistojn de nia lando. Ni estas firme konvinkitaj, ke tia Federacio plenumos la deziron de la tuta belga Esperantistaro.“

Kaj persone skribis s-ano Fr. Charles pri la aŭstria movado jenon:

„Oni povas diri, ke Aŭstria Esperantista Federacio estas imitinda ekzemplo por la tutmonda Esperantistaro. Mi atente kaj ĝoje sekvas la evoluon de la movado en via lando kaj mi kun aliaj envias vin pro la organizado de la aŭstria movado.“

Fine de Junio AEF ricevis de la sekretario Ph. Cullus, de Belga Esperanta Centra Komitato leteron kun jena sciigo ĝojinda:

„Fondiĝis en Belgujo Esperanta Belga Centra Komitato (EBCK), kiu grupigas delegitojn el Belga Ligo Esperantista, el Flandra Ligo Esp., el Belga Laborista E-Asocio, el Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esp. kaj el la Belga Sekcio de Tutmonda Junular-Organizo. La plej grava celo de tiu komitato estas reprezenti antaŭ ĉiuj oficialaj instancoj la t u t a n belgan Esperantistaron.

Kiel unua tasko ĝi elektis la aranĝon de ekzamenoj pri Esperanto-kapableco kaj disdono de diplomoj. Io simila ĝis nun ne ekzistis en Belgujo. Ni estus tre feliĉaj, se vi povus klarigi al ni kiel vi solvis la problemon en via lando, tio povus multege helpi al ni."

Ni ĝojegis pri tiu informo kaj deziras al niaj karaj belgaj ges-anoj la plej bonan sukceson en la komuna agado por la prospero de nia afero kaj esperas, ke EBCK ankaŭ trovos la ĝustan vojon por ordigi la organizajn aferojn tuŝitajn per la citita Malferma letero.

Por ĉiuj dise laborantaj E-asocioj kaj grupoj ĉiulande ankoraŭ nun kaj estonte validas, kion ni skribis fine de artikolo „60 jarojn Esperanto" en Aŭstria E-Revuo 7—9/1947: „Eklevu ni tial la verdajn standardojn en la jubilea jaro kaj ni konsciiĝu memore al la naskiĝo de Esperanto, ke la finvenko de la lingvo n u r povas esti la verko de k o m u n a kunlaboro en la naciaj kaj internaciaj Esperanto-movadoj!"

Hungarlanda Esperanto - Kongreso okazis kun bona sukceso pentekoste 1948 en Györ. Partoprenis 400 gesamideanoj, inter ili 4 bulgaroj, 1 svedo kaj 1 ĉeho. La aŭstriaj ges-anoj volintaj partopreni la kongreson bedaŭrinde ne ricevis la envojaĝpermeson de la hungara registaro.

La XI. Sokol-festaro estas la titolo de ilustr. faldprospekto en Esperanto eldonita de Komitato de la Sokola Kongreso okazinta dum Junio—Julio 1948 en Praha, ĈSR.

Sokol-Organizo en ĈSR donis kolektivan subskribon por 1 miliono da membroj por la priesperanta peticio de UEA al UN.

Vizitu SVIT (Altaj Tatroj) en Slovakio — Bele ilustr. faldprospekto Esperantlingva senkoste havebla de: Stefan Toth, SVIT, Altaj Tatroj, Slovakio, ĈSR. — La Esperantistoj de Svit aranĝis la 24.—28. 8. 1948 kulturajn tagojn kun prelegoj pri Svit, lingvaj problemoj, Esperantismo k. a. temoj.

Kontaktu kulture kun Sovjet-Unio

En „Internacia Kulturo" (Sofio) aperis artikolo titolita: „Kreu amasan kulturan kontakton kun Sovjet-Unio!", en kiu la aŭtoro atentigas, ke la tutmonda Esperantistaro multe povus helpi al la revivigo de la Esperanto-movado en USSR, se la Esperantistoj amase skribus al la Eldonejo de alilingva literaturo, petante Esperantlingvan katalogon pri eldonitaj libroj, kiuj aperis en la lingvoj angla, franca, germana, pola, japana kaj multaj aliaj. Skribu nur Esperantlingve kaj petu ankaŭ E-lingvajn eldonojn. Adreso: Eldonejo de alilingva literaturo, Zubovskij bulvar, d. 21, Moskva, USSR.

Ekspozicio de infanaj dezegnaĵoj en Lyon

De 23. 5.—13. 6. 1948 okazis en Lyon, Francujo, Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnoj, organizita de la Liona E-Societo. Pli ol 3000 desegnoj estis kolektitaj en tutmondo helpe de delegitoj de UEA. La ekspozicio, patronita de la urbestro, s-ro Herriot, de la prefekto, de la universitata rektoro kaj aliaj aŭtoritatoj, okazis en la festsalono de la Liona urbdomo.

Ekspoziciataj estis infanaj desegnoj el Francujo, Belgujo, Holando, Danlando, Norvegujo, Svedujo, Finlando, Anglujo, Polujo, Ĉehoslovakujo, Jugoslavujo, Germanujo, Aŭstrio, Palestinio, Aŭstralio, Madagaskar k. a. La ekspozicio ricevis multajn vizitantojn. Favoraj raportoj aperis en la gazetoj de Liono kaj estis dissendataj per radio.

Nun la tuta desegna materialo povas

esti metata je la dispono de aliaj E-societoj, dezirantaj organizi similan ekspozicion. Gi estos sendata senpage, sed la resp. societo, kiu ricevos la materialon, devos post sia propra ekspozicio siavice sendi la desegnojn al la sekvanta societo kaj pagi la transportkostojn. Pri informoj turnu vin al: s-ro Richard Levin, 55, Avenue Félix Faure, Lyon, Francujo.

Budapest — estas la titolo de bele ilustr. prospekto en E. pri la urbo Budapesto, ties hoteloj, muzeoj, teatroj k. s. Petu ĝin de: Fremdultrafika Oficejo de Budapest, V., Deak Ferenc-u. 2, Hungarujo.

Urbo Sao Paulo — La ŝtata Instituto de Geografio kaj Statistiko de Brazilo eldonis helpe de la Esperanto-Klubo Sao Paulo bele ilustr. kaj ampleksan prospekton pri la vidindaĵoj de tiu grandurbo en lingvoj portugala kaj Esperanto. Oni ekz. ankaŭ vidas la bildon de la nubskrabanto „Ameriko", sur kies 21a etaĝo instaliĝis la sidejo de la Sao Paulo Esperanta Klubo.

Bulgarujo — Okaze de la 31. Bulgara Esperanto-Kongreso en Jambol (21.—23. 8. 1948) eldoniĝis speciale verkita kaj ilustr. kongresbroŝuro, kiu montras la aktivecon de la bulgara Esperanto-movado.

Bibliografio

Statistika Resumo pri Brazilo 1946 — Alportis al ni la poŝto ĉi tiun interesan libron, Form. 27 × 19, 267 pĝ. Eldonita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, Rio de Janeiro, eldonjaro 1947. La volumo donas multegajn detalajn informojn pri ĉiuj kampoj de la homa agado en Brazilo en la lingvoj portugala, angla kaj — tio estas la plej grava — en Esperanto.

Oni vere devas gratuli al la nomita instituto pri ĉi tiu ampleksa statistika informilo kaj danki al ĝi, ke ĝi, alprenante ankaŭ la lingvon internacian, kvazaŭ ŝtate oficialigis Esperanton.

Morto de Trajno — Bonstila bindita romano, form. 19 × 13, 256 pĝ. de Freeman Wills Crofts. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Prezo: 9 angl. ŝil., afranko 6 p. Mendebla: pogrande ĉe la eldonejo, podetale ĉe la landa libro-servo aŭ ĉe UEA, Rickmansworth.

La Forto de l'Vero — Broŝ. romaneto de ADI, eldonita de la Dansk Esperanto Forlag, Aabyhoj, 1948, dua eldono, 62 pĝ., prezo 3,— d. kr. La volumeto estas rekomendinda legolibreto por komencantoj, ĉar la teksto estas facile legebla kaj bonstila. La agantaj personoj ankaŭ ludas en la rondo de Esperantistoj.

La reala vivo de nia Sinjoro kaj savinto Jezuo Kristo — Verkita de Marika Dragona. Broŝ. libro, form. 22 × 15, 123 pĝ. Aperis en Tesaloniko, Grekujo, 1947. En ĉi tiu libro parolas religie kredema socialistino el greka malliberejo al siaj gefiloj, komparante la instruon de Kristo kun la doktrino de l' marksismo kaj admonas ilin labori por la finvenko de l' socialismo.

Johano la brava — De Sandor Petöfi, el la hungara esperantigis la konata verkisto Kolomano Kalocsay. Popolfabelo en versoj, naiva epopeeto. Kartonita, form. 17 × 12, 66 pĝ. La neologismoj uzataj en la versaro estas ĉe la fino klarigitaj sur aparta paĝo. Prezo: 0,80 us. dol. plus 10% sendkostoj. Dua eldono. Eldonis Literatura Mondo, Budapest VIII., Rökk, Szilard-str. 28, Hungarujo.

La Portugala Literaturo — De Agostinho da Silva. Kajero el la jam konata popularscienca serio, 27 pĝ., eldonita de la Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa, 49 — 1., Porto, Portugalujo. La libreto celas koncizmaniere enkonduki la leganton en la literaturon portugalan.

Lu Sin: Elektitaj noveloj — Karton. kovrilo, form. 19,5 × 13,5, 140 pĝ. kun 12 belaj noveloj el la ĉina medio. Oni miras, kiel flua estas la stilo de la tradukado, ke oni ne opinias legi orientajn rakontojn, se ne atentigus pri tio la ĉinaj nomoj kaj homtipoj. (Eldonjaro 1939. La libron sendis S. C. Fang, 28 Chaotung Road, Shanghai, Ĉinio.)

Adressen und Zusammenkünfte der Wiener Esperantogruppen:

Gruppe „Centro“: I., Neutorgasse 9. Donnerstag von 18—19 Uhr, Esp.-Centro. Kor. Adr.: Gabriel Katzianka, IX., Rossauerlände 27.

„Verda Stelo“: V., Stöbergasse 11, Montag 20—21,30 Uhr; Volksbildungshaus. Kor. Adr.: Hugo Braun, V., Margaretengürtel 102/14/24.

„Danubio“: VII., Sigmundgasse 14 (Gasthaus). Jeden 2. und 4. Sonntag 10—12 Uhr. Kor. Adr.: Raimund Cech, VII., Lindengasse 8/11.

„Konkordo“: X., Wielandgasse 16; Samstag 18,30—21 Uhr. Kor Adr.: Anton Hirnich, X., Wielandgasse 16.

„Libereco“: XII., Längenfeldgasse 19; Mittwoch 19—21 Uhr. Kor. Adr.: Wilhelm Pachmann, XII., Am Fuchsenfeld 10—15.

„Harmonio“: XV., Markgraf-Rüdigerstr. 4, Freitag 19—21 Uhr. Gewerkschaftshaus. Kor. Adr.: Emil Vokal, XV., Preysinggasse 4/13.

„Nia Vojo“: XVI., Wattgasse 15; Freitag 19—21 Uhr, Feuerwehrschule. Kor. Adr.: Ludwig Sager, XVI., Maderspergerstraße 14/12.

„Laboro“: XVIII., Schopenhauerstraße 49, Freitag 19—21 Uhr, Schule. Kor. Adr.: Hugo Kraus, XVIII., Salierigasse 25.

„Suno“: XXI., Jedleseerstraße 66—94, 10/II/10, Montag 19—21 Uhr. Kor. Adr.: Ludwig Kraus, XXI., Freytaggasse 10/24/10.

„Kaisermühlen“: Kaffee Goethehof, Montag 19—21 Uhr.

„Klosterneuburg“: Kor. Adr.: Friedrich Ebner, Klosterneuburg, Markgasse 5.

Eisenbahner: Kor. Adr.: Josef Zink, X., Endlichergasse 2—4/17.

Lehrer: Kor. Adr.: Prof. Robert Frühmann, XVI., Ottakringerstraße 35.

Wissenschaft: Kor. Adr.: Prof. Dr. Hugo Sirk, III., Baumgasse 26.

Jugendliche: Kor. Adr.: Berta Westa, XV., Holochergasse 33/11. Lokal: XV., Markgraf Rüdigerstraße 4, Freitag 19—21 Uhr.

Katholiken: Kor. Adr.: Walter Mudrak, III., Beatrixgasse 19/9. Lokal: I., Graben 3, Stiege I/II-rechts, 2 a K. 4 a. Dienstag 17—19 Uhr.

Postgruppe: Kor. Adr.: Johann Janecka, XIX., Diemgasse 3. Lokal: I., Postgasse 8. Jeden 1. Donnerstag im Monat 18—20 Uhr. Postdirektion.

Straßenbahner: Kor. Adr.: Hugo Braun, V., Margaretengürtel 102/14/24. Lokal: I., Neutorgasse 9, jeden 1. Dienstag im Monat 18—20 Uhr.

Arbeiter-Esperantisten: Kor. Adr. und Lokal: I., Neutorgasse 9. Zusammenkunft: Jeden 1. Samstag im Monat 16—19 Uhr.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. Papierzuweisung 101/47/10—12/ Bezugscheinnummer 61/86.

16 paĝa broŝuro, eldonita de Aŭstria Laborista-Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9.
Prezo: Aŭstrio, —.50 S. (kun afranko —.60 S).
Eksterlando, 1 respondkupono (inkl. afranko).

Esperantistoj, aĉetu ĉe Esperantistoj!

Dua listo de firmoj kaj vendejoj, kie oni parolas Esperanton:

Franz Stanke, vendejo por ledo kaj ledaĵoj, Krems a. D., N.-Ö., Herzogstr. 7.
Josef Plommer, papervendejo, Krems a. D., N.-Ö., Untere Landstraße 60.
Gastejo Wögerer, Krems a. D., N.-Ö., Körnermarkt 9, kunvenejo de la E-grupo „Wachau" (kunveno ĉ. unuan lundon en la monato).
J. Neuberger, ĉapelisto por gesinjoroj, Krems a. D., N.-Ö., Spenglergasse.
Oskar Hiedler, buĉisto kaj kolbasisto, Krems a. D., N.-Ö., Untere Landstr. 54.
Karl Hofstätter, vendejo por paperaĵoj kaj librobindisto, Stein a. D., N.-Ö., Landstraße 60.

Vbb (Zl. 3216/1947)

La Esperanto-eldoneĵo

TRAMONDO

Vieno I., Neutorgasse 9

reduktis la prezojn de jenaj libroj:

	anstataŭ šil.	nun nur šil.
Handwörterbuch Esperanto—Deutsch	9,—	7,—
„Senhalte al la celo“, legolibreto de A. Norbert	4,—	3,50
„La mondopaco kiel psikologia problemo“ de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk	3,—	2,—
„Tri majstronoveloj“ de Stifter, Storm, Kleist, tradukitaj de E. Pebe	5,50	3,—
„Junaĝo“ de A. Stieger, tradukita de F. Th. Bischof . . .	3,—	1,—
„La kvar paĝoj de la mondo“, de la samaj aŭtoro kaj tradukinto	2,—	1,—
La prezoj por la ceteraj eldonaĵoj restas neŝanĝitaj:		
„Freude durch Esperanto“, lernlibro de Hugo Steiner		6,—
„Esperanto, Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen“		3,50
„Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes“ (Aŭstria Esp. Instituto) .		6,—
„Tabeloj por la intua instruado de Esperanto“ de Fr. Mestan . .		1,50
„La mortado“ de H. Nothnagel, tradukita de B. Selzer		2,—
„La malgranda helpanto“, instru- kaj legolibreto el „Verda Biblioteko“		1,50

Ĉiu esperantisto aĉetu almenaŭ u n u libron por si aŭ eksterlanda amiko, por helpi per tio al la plua eldonado de Esperanto-libroj. Mendu rekte ĉe „Tramondo“ aŭ per via Esperantogrupo!